

1978 julio – aŭgusto

71-a jaro

n-ro 871-2 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Romo: Fervojistoj kaj parlamentanoj

Vi trovos

ke ĉi tiu numero de la revuo neniel konsideras la fakton, ke la plimulto de niaj legantoj vivas je la feriaj latitudoj dum julio kaj aŭgusto. La numero do pretendas esti dinamisma kaj mal-feria kaj alportas plurajn gravajn tekstojn kaj interesajn novaĵojn. Temas ja pri la lasta revunumero antaŭ la ĉi-jara Universala Kongreso. Se estas malfrue komuniki ion gravan al la vojaĝantoj al Varno, ne estas superflue nun atentigi, ke la 63a UK en Bulgario jam registris pli ol 4 070 aliĝintojn kaj do "minacas" listiĝi kiel unu el la plej amasaj kongresoj en la historio de la Movado. Nu, se vi en tiu kongresa tumulto renkontos la redaktoron, ne hezitu kritike aludi la revuon. Eventuale do — ĝis Varno!

Enhavo

- 129 Eksteraj rilatoj de UEA: Fine oni ĉesas nur atendi (S. Milojević)
- 130 Disvastigo de la Movado: Mil lernolibroj por evolulandoj (sm); Premio "R. Schwartz" (W. Auld); Internacia Gazetara Servo (IGS)
- 131 Teatra Esperanto-Renkontiĝo: En Gdańsk: Plena teatra korbo (Roman Dobrzyński); JEI en nova domo
- 132 Pupteatra festivalo en Norvegio: La norda PIF (Spomenka Štimec)
- 133 Institucio Hodler '68: Duobligi la kapitalon! (G.M.): Scienco kaj evoluigo
- 134 Okaze de la reeldono de la kaloĉaja poemaro "Izolo": Kalocsay, la kolosa diletanto (Reto Rossetti)
- 136 Lingvo-problemo: Kion diris M'Bow en Lucerno?
- 137 Kvarlingva aero (whj)
- 138 30a IFEF-Kongreso: Fervojistoj en la itala metropolo (Gernot Ritterspach)
- 139 Recenzoj: "Je la flanko de la Profeto" (M.H. Saheb-Zamani); "Elementa zoogeografio" (E. Balech); "Tiele parolis Zaratuŝtra" (W. Solzbacher); "Originoj de la vivo" (G.F. Makkink); "Francisko el Asizo: Profeto por nia tempo", "Sankta Francisko: Poeziaĵoj" (Giulio Cappa)
- 142 Kalendaro; Laste aperis (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 143 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 145 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio Nekrologoj (J. Bastert, E. Ekström, P. Gianelias, R. Nisida, T.M. de Quaasteniet, D. Quarello)
- 146 Ekzameno E (Bernard Golden); Foresto de la prezidanto
- 147 Anoncetoj
- 148 Esperanto en radio — kompleta tabelo (Georges Larglantier)

La kovrilo

Kvankam estas pli-malpli certe, ke nian septembran numeron tradicie ornamos sur la kovrilo iu sceno en la ĉi-jara Universala Kongreso, jen tamen jam nun kongresa foto sur la kovrilo. Ni ne faras tion nur pro la fakto, ke IFEF ja estas la plej granda faka organizaĵo de la Esperanto-movado kaj ke la Kongreso en Romo estis jubilea, ĉar la 30a. La kovrila foto bele ilustras alian tre gravan trajton de la fervojista faka organizaĵo kaj ties kongresoj: En Romo ne kongresis nur IFEF sed kiel la podia slogano atentigas ankaŭ FISAIC, faka ne-movada fervojista organizaĵo, kun kiu IFEF jam dum multaj jaroj tre intime kunlaboras. Ne temis tamen pri vera kongreso de FISAIC sed pri la fakto, ke tiu renoma asocio konsideras la Kongreson de IFEF esti unu el siaj propraj aranĝoj. Tia intima kunlaboro kun ne-movadaj fakaj organizaĵoj estas pli ol bona ekzemplo por ĉiuj aliaj fakaj organizaĵoj de la Esperanto-movado. Krome, sur la kovrila foto la Kongreson alparolas itala senatano Alberto del Nero, kio estas plia signo de la imitinda ekstermovada malfermiteco de IFEF.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Milańówek, Pollando; tel. 58-37-08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

Fine, oni ĉesas nur atendi

NE VENIS la letero, kiun promesis la kolore presita telegramo sur la paĝo 126 de nia junia numero. Anstataŭe, venis Esperanta letero de hungaro, vivanta en Jugoslavio, kiu lastatempe estis en Rumanio kaj en germanlingva ĵurnalo legis pri "universitata oficialigo de Esperanto" en tiu lando. Se tiu mia, cetere maldiligenta, amiko decidiĝis skribi, estante laŭ propra konfeso nur "konsumanto" de Esperanto kaj ne movadano krom per kotizpagoj, tio ja signifas, ke io grava okazas pri la Internacia Lingvo en Rumanio.

La 25an de majo 1978, d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, faris unuhoran viziton al Lia Ekscelenco M. Nicolae Nicolae, ambasadoro de Rumanio en Vaŝingtono. Temis pri vizito laŭ peto de la prezidanto de UEA. La interparolo koncernis Esperanton ĝenerale sed ankaŭ la neklaran kaj iom anakronisman staton de la Esperanto-movado en tiu lando. D-ro Tonkin decidiĝis vojaĝi al Rumanio kaj petis tiurilatan helpon de la ambasadoro, por en Bukareŝto renkontiĝi kun registaranoj, kiuj povus kompetente trakti la demandojn pri Esperanto en Rumanio. La prezidanto de UEA estos en Bukareŝto la 13an de julio.

Pli frue, la 22an de majo 1978, la prezidanto de UEA, aŭstralia ambasadoro ĉe UN Ralph Harry kaj mag. Probal Daŝgupto, hindo kiu sekvas postdiplomajn studojn en la Universitato de Nov-Jorko kaj tie partoprenas en la laboroj por reprezenti UEA ĉe la sidejo de UN, faris viziton al Lia Ekscelenco Rikhi Jaipal, ambasadoro de Hinda Unio ĉe UN. La vizito ĉefe rilatis la lingvan problemon en UN mem kaj planojn fari proponon pri eksperimenta uzo de Esperanto en la interna dokumentado de UN.

En marto ĉi-jare, d-ro Tonkin kaj mag. Daŝgupto renkontiĝis en Nov-Jorko kun s-ro Wang Fu-sheng, unua sekretario de la Konstanta Misio de Popola Respubliko Ĉinio ĉe UN, kaj kun s-ro Leonid Romanov, konsilisto en la Konstanta Misio de Soveta Unio ĉe UN. Tio estis, kompreneble, du apartaj interparoloj dum kiuj diskutiĝis unuavice la projekto pri eksperimenta uzo de Esperanto en UN. Ke en tiuj konversacioj ne temis pri simplaj diplomataj afablaĵoj, atentigas frazo en posta letero de la prezidanto de UEA al la soveta diplomato, kiu konsentis siatempe komenti malneton de la projekto. Fine de junio d-ro Tonkin klopodis aranĝi viziton ankaŭ al la ambasadoro de Madagaskaro ĉe UN, sed ni ne sukcesis ricevi konfirmon, ke tiu renkontiĝo jam okazis. Multe pli frue d-ro Tonkin renkontiĝis kun la ambasadoro de Bulgario kaj traktis ĉefe demandojn ligitajn al la 63a UK en Varno.

Al niaj legantoj ni ankoraŭ ŝuldas detalojn pri tiu nova projekto ĉe UN. Tamen, kiel oni povas konkludi el la ĉi-supre menciitaj informoj kaj aludoj, temas en la nuna stadio unuavice pri la necesaj sondoj kaj antaŭprearoj.

Ni do plue ŝuldu al vi tiujn detalojn kaj atendu plian fazon de ilia solidiĝo. Kaj, kvankam ĝuste tiu projekto ĉefrolis en la lastatempaj diplomataj paŝoj de la prezidanto de UEA, ni emas ĉi-foje aparte emfazi trajton, kiu fonis en kelkaj el tiuj interparoloj.

Ni en la Movado komprenas aŭ devus bone kompreni, kion signifas aŭ povus signifi kvazaŭ preteraj aludoj en la renkontiĝoj kun la diplomatoj de Ĉinio, Rumanio kaj Soveta Unio pri la organiza stato de la Esperantomovado en tiuj landoj. Jam kelkajn jardekojn oni bone konscias pri la fakta neekzisto de memstaraj movadaj organizaĵoj tie. Oni konscias kaj simple atendas. Ni dubas, ke alia serioza iniciato aŭ publika elpaŝo de la internacia Movado okazis ĉi-rilate post la siatempa — antaŭ preskaŭ 30 jaroj — publika letero de SAT kaj UEA al Stalin, kiu ja mortis antaŭ kvarona jarcento. La neadekvateco de la organiza stato de la Movado en tiuj landoj plej efike atestas la amasa ekzisto de Esperanto-parolantoj kaj aktiveco tie. Ĉu ne sufiĉe elokventas tiurilate la informoj, ke Esperantaj eldonaĵoj en Soveta Unio elĉerpiĝas en kelkaj semajnoj eĉ kiam temas pri plurdekmila eldonkvanto? Tiuj rumanaĵoj, kiuj dum la lasta jardeko gajnas premiojn pro la plej bona sceneja uzo de Esperanto, efektive venas el Rumanio. Ĉu oni foje pensas, ke la granda eldona aktiveco de Ĉinio en Esperanto devus havi iun pli realan homfortan fonon, kiu kaŝas sin malantaŭ tiu eterna "P.O. Kesto 313" en Pekino? Kiam antaŭ du jaroj s-ro Woessink travojaĝis Pekinon, li estis tie akceptita ne kiel privata vizitanto sed kiel estrarano de UEA.

Malfacilas nun aŭguri la rezultojn de la okazonta vizito de d-ro Tonkin al Rumanio. Eble ĉi-foje eĉ ne aperos tujaj sekvoj de tiu vojaĝo. Sed la fakto mem, ke oni do fine ĉesas atendi, ke nur rumanoj mem solvu la organizajn demandojn de la Movado en tiu lando, — tio jam estas grava okazaĵo. Ni ne emas vidi en ĉio ĉi simplan eluzon de la feliĉa fakto, ke la prezidanto de UEA hazarde loĝas en relativa proksimeco de grava diplomatia centro. Ni volas konkludi el la lastatempe faritaj vizitoj, ke okazas grava ŝanĝo en la sinteno de UEA al la praktikado de la eksteraj rilatoj. Okazas ŝanĝo de pasiva atendado al dinamisma iniciatemo.

S. Milojević

LASTMOMENTA NOVAĴO: En sia kunsido de la 14a de junio 1978, la konsilantaro de la literatura fako de la fakultato de humanismaj studoj en la Centra Universitato de Venezuelo decidis starigi KATEDRON DE ESPERANTO.

Premio „R. SCHWARTZ”

Jam en decembro 1975 UEA anoncis la premion ”Raymond Schwartz”, kaj sendube en multaj lokoj de la mondo niaj aŭtoroj diligente prilaboras siajn manuskriptojn cele al gajnado de tiu elstara premio de 4 300 ned. gld. (jes, kvar mil tricent!)

Temas pri anonima donaco, kies malavara donacinto volas kuraĝigi la kreadon de originala prozo en Esperanto. Se niaj aŭtoroj ne decidiĝis partopreni la konkurson, ankoraŭ ili havas tempon por tio — ĉar la limdato estas la 30a de septembro 1979. Sed pri kia konkurso ja temas?

La premio Schwartz estos aljuĝita al la plej bona ”ankoraŭ ne eldonita proza fikciaĵo en Esperanto”. Laŭ la regularo, la esprimo ”proza fikciaĵo” inkluzivas romanojn kaj koherajn novelarojn. La plena regularo estas ricevebla ĉe s-ro Alec Venture, 7 Grosvenor Road, Wallington, Surrey, SM6 0EG, Britio. Ĉiu konkursa verko devas ampleksi minimume 40 000 vortojn.

W. Auld,
estrarano de UEA

DISVASTIGO DE LA MOVADO:

Mil lernolibroj por evolulandoj

EN LA PASINTAJ kvin jaroj 1973-1977 UEA senpage dissendis tra la mondo diversajn lernolibrojn kaj vortarojn en suma valoro de 6 697,97 guldenoj. Pli ol triono de tiu sumo elspeziĝis en la jaro 1977. En la unua duono de la jaro 1978 la sumo de la senpage distribuitaj lerniloj de Esperanto jam atingis tri mil guldenojn. Ĉiuj ĉi sumoj rilatas la elspezojn el la Propaganda Konto de UEA kaj por havi pli kompletan bildon pri la ĉi-kampaj investoj necesus aldoni ankaŭ la elspezojn el la Fondaĵo Azio-Afriko (ĉ. 4 000 gld. dum la lastaj kvin jaroj). Tamen, ĉi tiuj sumoj ne enhavas apartajn subvenciojn por eldono de lerniloj en la evolulandoj, kie la Propaganda Konto kelkfoje intervenis dum la menciita periodo.

Dum la lastaj semajnoj efektiviĝas unu el la plej grandaj projektoj rilate la subtenon de la Movado en la evolulandoj. Jen pri kio temas:

Pretigante novan eldonon de la jam fama internacia lernolibro de Vilho Setälä, *Privilegia vojo al lingvoscio: Esperanto*, la aŭtoro kaj la eldonejo Fondumo Espera-

nto proponis al UEA aĉetn de mil ekzempleroj de la lernolibro por senpaga distribuo ekskluzive en la evolulandoj. La eldonejo ofertis tre grandaniman prezon de unu guldeno por ĉiu ekzemplero, plus la transportokostoj inter Helsinki kaj Roterdamo. La Estraro de UEA jam pasintjare akceptis kun danko la proponon de d-ro Setälä, honora membro de UEA. En majo ĉijare la mil lernolibroj fine atingis la Libroservon de UEA, kiu pretigis cirkuleron kaj dissendis ĝin al plurdeko de adresoj en pli ol 40 landoj tra la mondo. Sekvis surprize rapidaj reagoj de entuziasmaj aktivuloj en tiuj landoj, kiuj ĝojkriis pro la ebleco ricevi grandkvante senpagajn lernilojn. Pluraj centoj da ekzempleroj de *Privilegia vojo* jam ekvojaĝis al Afriko, Azio, Oceanio kaj Sud-Ameriko. Ĉiutage venas novaj respondoj al la cirkulero kaj ekspediĝas novaj dekoj da lerniloj al la landoj en kiuj ĝis nun ne ekzistis la Movado. La cirkulera propono intence ne iris al kelkaj evolulandoj, kiuj jam havas movadajn tradiciojn kaj posedas Esperanto-lernilojn en sia nacia lingvo (Argentino, Brazilo, Koreo k.a.).

Kiam oni en la Libroservo de UEA aldonos la afrankon, pakmaterialon, laboron ktp., montriĝos, ke ne temis pri mil guldenoj por mil lernolibroj sed pri konsiderinde pli granda sumo per kiu la Propaganda Konto de UEA helpas la disvastigon de la Internacia Lingvo en la evolulandoj. Tamen, la iniciata malavara gesto de Vilho Setälä kaj Fondumo Esperanto povus roli kiel inspiro ankaŭ al aliaj movadaj eldonejoj por pensi pri similaj entreprenoj, kiujn UEA ĉiam pretas serioze konsideri. Aliflanke, niaj komencaj ciferoj pri la elspezoj el la Propaganda Konto celas respondi al unu el la demandoj, kiuj koncernas la kongreskotizojn de UEA. Necesas scii, ke la Propaganda Konto pleniĝas preskaŭ ekskluzive el kongresaj elspezoj. Kiam oni do pagas la kongresajn kotizojn, oni konsciu, ke grava parto de tiu mono iras rekte en la konton el kiu UEA helpas la Esperanto-movadon en la evolulandoj. Krome, valoras noti, ke niaj enkondukaj ciferoj pri la elspezoj el la Propaganda Konto ne koncernas la kostojn de la koresponda informlaboro, kiun ĉiutage plenumas la Centra Oficejo kaj funkciuloj de la Asocio.

INTERNACIA GAZETARA SERVO (IGS):

Ekde sia reviviĝo pasintan decembron, IGS dissendis plurajn anglalingvajn novaĵbultenojn al centoj da anglalingvaj gazetoj tra la mondo. Necesas nur taksi kiom kaj kiuj el tiuj gazetoj efektive utiligas la bultenojn. Se en via lando eldoniĝas anglalingvaj gazetoj, ni petas vin atenti artikolojn en kiuj aperas mencio pri Esperanto. Se vi kredas, ke iu artikolo fontis de la IGS, bonvolu sendi al ni la koncernan eltondaĵon kaj mencii la aperdaton kaj nomon de la gazeto. Ĉiujn korespondaĵojn por IGS adresu al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Esperanto-Teatro de Finnlando prezentigis en Gdańsk per fragmentoj el la mondfama "Kalevala".

TEATRA ESPERANTO-RENKONTIĜO:

En Gdańsk: Plena teatra korbo

Tuta ĉeno de sinsekvaj Esperanto-aranĝoj logis fine de majo kaj komence de junio pli ol 800 partoprenantojn el deko da landoj. La plej alloga inter la aranĝoj sendube estis la Teatra Esperanto-Renkontiĝo pri kiu ni raportas ĉi-sube.

DE LA 28a de majo ĝis la 1-a de junio okazis en Pollando Teatra Esperanto-Renkontiĝo. La ideo aperis en Rejkjaviko dum la UK. La Komisiono pri Kulturo de Pola Esperanto-Asocio (PEA) ĝin decidis realigi en Gdańsk, kie oni trovis eksterordinare favoran sintenon flanke de la urbaj aŭtoritatoj.

Ne valoras diskuti, kion signifas teatro-arto por la Internacia Lingvo. Ĝi formas per si mem gravan kampon por la evoluo de la vivanta lingvo parolata, kontribuas suprenlevi la nivelon de la lingvouzo kaj servas al unuopa esperantisto per aŭtentikaj kulturaj valoroj.

Teatro-prezentoj akompanis ekde la komenco la Universalajn Kongresojn. Sed dum la kongresoj aŭ aliaj Esperanto-aranĝoj teatroj funkciis suplemente al la ĉefprogramo. Kutime troŝarĝita programo ne kapablis enguti pli ol unu aŭ du spektaklojn, dume oni observis lastatempe kreskotendencon de teatra aktiveco en la Esperanto-movado.

La estraro de UEA ŝirmis la aranĝon per siaj aŭspicioj, kiuj ĉe la ĝerma organiza fazo estis influhavaj. La vizito ĉe la estro de la kulturinstanco de Gdańsk, Jerzy Kiedrowski, kiun ni efektivigis kune kun la aŭspici-peranto Charles Power, helpis ricevi definitivajn decidojn. La decido koncernis sufiĉe altan sumon, necesan por organizi la aranĝon, kaj disponon pri la teatro "Miniatūra" kun kompleta ekipaĵo kaj teknika personaro.

Valoras aldoni kelkajn vortojn pri la motivoj de tiel favora decido. Unue, Gdańsk apartenas al la plej ak-

tivaj kulturcentroj de Pollando; due, Esperanto ĉesis esti sur tiu tereno io nekutima; trie, la Internacia Lingvo konfirmis tie sian kvaliton de kulturfenomeno dank' al la pasintjare organizita Tutpollanda Trarigardo de la Esperanto-kulturagado. Kaj finfine mi aldonu, ke ĉiu agado dependas de konkretaj homoj; en Gdańsk motoras du inteligentaj kaj energiaj virinoj, Jadwiga Greger kaj Elwira Twardowska.

La inaŭguro okazis en la impona renesanca salono (16a jarcento) de la urbodomo. Samtempe okazis malferma kunsido de la ĉefa estraro de PEA inaŭguranta serion da solenaĵoj okaze de 70-jaraĝo de la Esperantomovado en Pollando. Dum tri sinsekvaj tagoj okazis ses spektakloj.

Teatro Esperanta de Parizo (TESPA) prezentis la teatraĵon de E. Ionesco *La kalva kantistino*; Esperanto-Teatro de Finnlando surscenigis fragmentojn de *Kalevala* kaj la skeĉon de M. Boulton *La unua helpo*; Studenta Esperanto-Teatro el Zagrebo (Jugoslavio) alfrontis la publikon per la teatraĵo de N. Šerment *La nevidebla Leonardo*; la lerneja teatro de Sopot (Pollando) preparis la fabelon de H.C. Andersen *Paŝtistinetto kaj kamenpurigisto*; Pola Esperanto-Teatro prezentis la teatraĵon de A. Cwojdzinski *Hipnoto* kaj la aktorino el Krakovo Jadwiga Gibczyńska proponis monodramon laŭ B. Leśmian *Slavaj fabeloj*. Detala prezento de la dramenhavoj, ilia lingva nivelo, surscenigmaniero kaj arta interpreto postulas apartan recenzon. Tian prezenton malfaciligas ĉiuokaze la fakto, ke apud la profesiuloj aktoraj amatoroj. Tamen kelkaj rimarkoj sin trudadas: Jen en la Esperanto-versio de *La kalva kantistino* okulfrappe reliefigis la problemojn de homa interkompreniĝo. Aliflanke surprizis perceptfacileco de tiu

JEI en nova domo



"DOMO por JEI", ni skribis en novembro 1977 (p.189). En duona jaro la revoj efektiviĝis: La 18an de junio solene inaŭguriĝis en Tokio la nova propra 4-etaĝa domo de Japana Esperanto-Instituto. Ĉeestis centoj da gastoj, kiuj aŭdis i.a. specialan mesaĝon de la prezidanto de UEA. Jen do la "Domo de JEI".

ĉi dramo, difinata kiel absurda, kion oni sendube ŝuldas al la elstara traduko de G. Lagrange. La finnlandan grupon defendis plej efike la grandioza *Kalevala* mem; la junaj zagrebanoj akiris simpatian per sia freŝa kaj senpretenda amatoreco, en sia prezentaĵo ili tuŝis aktualan problemon, nome solecon de juna homo en la moderna socio. La aktoroj de Pola Esperanto-Teatro, Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzyński troviĝis firme sur sia rutina, profesia nivelo. Jadwiga Gibczyńska, ankaŭ profesia aktorino, kiu dediĉis sian talenton por Esperanto, entreprenis ambician taskon individue sonopentri subtilajn imagojn de la pola poeto, Bolesław Leśmian.

Teatra Esperanto-Renkontiĝo estis ĝis nun senprecedenca aranĝo en la Movado. Ĝi estis efektiva **renkontiĝo** de la esperantistaj teatroj. La trupoj ne nur prezentis, sed ankaŭ aŭde spektis. Ekfunkciis interesa kutimo diskuti tuj post la spektakloj. Oni respondis demandojn de la publiko, oni kritikis kaj polemikis. La aranĝo ekposedis sian propran intelektan sangocirkuladon. Cetere la geaktoroj havis ĉiutagan oportunecon inter-

ŝanĝi pensojn kaj spertojn. Tamen okazis ankaŭ labor-kunsidoj, dum kiuj oni povis i.a. ekscii, kiom da persisto, kiom da streĉo, kiom da laboro kaj finfine mono postulas tiaspeca agado. Plej tede oni sentas izolitecon, tial ripetiĝis postulo pri fakgazeto, kies rolon povus komence plenumi la TESPA-bulteno *Kulisoj*. En la sceneja praktiko de la Renkontiĝo oni eksentis mankon de teatro-terminaro. Oni vidas ankaŭ neceson organizi centran magnetofon-bendaron kun Esperanto-teatraĵoj. La aranĝo estis same el la propaganda vidpunkto tre efika, kio rezultis miaopinie el la fakto, ke ĝi havis ĉefe "teatran" kaj ne "esperantistan" karakteron. Kaŭze de la simpla akcentŝovo plivastiĝis interesiĝo pri la aranĝo kaj Esperanto mem komplemente al teatro surprize malkovris sian novan allogan flankon.

Se oni de iu ajn vidpunkto pritraktas la aranĝon, oni devas konkludi pri neceso de ĉiujara ripetado de teatra Esperanto-renkontiĝo. Povas nur bedaŭri, kiuj ne venis al Gdańsk. Sed kien oni iru venontjare, kiu entreprenos la organizan taskon?

Roman Dobrzyński

PUPTEATRA FESTIVALO EN NORVEGIO:

La norda PIF

PUPTEATRA Internacia Festivalo (PIF), kiu dum jaroj per Esperanto kunvenigas pupteatrojn en Jugoslavio, unuafoje grandskale prezentiĝis en alia lando: inter la 11a kaj 14a de junio la Festivalo gastis en Tromsø, en la norda Norvegio, fraturbo de Zagreb (Jugoslavio), kie la aranĝo disvolviĝis ekde 1967. La du ĝemelurboj, Tromsø kaj Zagreb, la unuan fojon organizis komunan kulturan aranĝon. La fakto, ke Esperanto peris ĉi tiun kunlaboron ĝojigis ne nur la organizantojn el Jugo-


slavio — Internacia Kultura Servo. La Festivalo ne povus okazi sen abunda helpo de Norvega Esperantista Ligo, samkiel de lokaj esperantistoj en Tromsø.

Dum kvar tagoj, 68 pupistoj el Jugoslavio, Pollando, Norvegio, Rumanio kaj Svedio prezentis 26 spektaklojn — el kiuj en Esperanto 19. La norvega TV-reto, krome, filmis du prezentaĵojn en Esperanto: *Ludoj sen fino* de Jadranka Ĉunčić de la zagreba pupteatro "Kvak" kaj *Animeto* de Clemens Brentano, teatraĵo el la rumana urbo Baia Mare.

Por la Esperanto-movado en Norvegio montriĝis aparte valora la fakto, ke la plej populara TV-pupo de Norvegio malfermis la Festivalon kaj intervjuis por TV-elsendo Esperanto-parolantajn infanojn el Jugoslavio kaj Norvegio, kiuj ĉeestis la Festivalon kaj prijuĝis ĝin. Ekzistas ebleco, ke la interesitoj per interŝanĝo havigu

PREMIOJ DE LA 11a PIF Sekcio "Pupoj parolas al infanoj" Tromsø, Norvegio, 1978 06 11 — 14

1. La festivalan ĉefpremion — skulptaĵon "Renkonto" de la zagreba skulptisto Zlatko Zlatić, kiun atribuas la jugoslava revuo *Arena* — gajnis la pupteatro "Kvak" el Zagreb por la prezentaĵo *Ludoj sen fino* de J. Ĉunčić.
2. La premion de la internacia infana ĵurio — la pupon "Piko Bodljić", kiun atribuas la jugoslava revuo *Studio* — gajnis la pupteatro el Oslo por la prezentaĵo *Bestoj sur radoj* de Kjersti Germeten.
3. La lingvan premion "Jozefo Petrin" (kiun atribuas Ĝiĝi Harabaĝiu el San-Francisko, memore al la forpasinta multjara rumana kunlaboranto de PIF) gajnis la pupteatro el Baia Mare (Rumanio) por la spektaklo *Animeto* de Clemens Brentano.



Rumanaj pupteatroj en PIF jam tradicie gajnas la premion por la plej bona sceneja uzo de Esperanto: En Tromsø la premio iris al "Animeto" de la pupteatro el Baia Mare.

tiun dufoje 50-minutan programon (en video-kasetoj) kaj prezentigu ĝin ĉe alilandaj televidaj centroj. (Kontaktpersono: s-ro John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11; tel. 02 — 28 30 35). La programoj estos elsenditaj fine de ĉi tiu jaro kaj oni antaŭvidas senteban interesigon pri Esperanto en la infanaj rondoj. Oni ja devus taŭge utiligi tiun interesigon.

La aranĝo per si mem estis sukcesa. Dum la malferma ceremonio aŭdiĝis opinio, fare de la zagreba vicurbestro Zorislav Sonje, "ke en Jugoslavio Esperanto prenis sian lokon inter kulturaj institucioj" kaj ĝia funkciado en Norvegio nur konfirmis la eblan rolon de Esperanto sur internaciaj teatraj scenejoj.

En oktobro ĉi-jare okazos en Zagreb la dua parto de la Festivalo. Tromsø gastigis nur la festivalan sekcion "Pupoj parolas al infanoj", dum en Zagreb prezentigos la sekcio kun spektakloj de universala karaktero, interesaj por infanoj kaj plenkreskuloj. Tie krom la kutimaj eŭropaj landoj sin prezentos ankaŭ ĉinoj, kiuj en Esperanto ludos *Pilgrimo al okcidento*.

La komunumo de Tromsø prizorgis kvaronmilionon da norvegaj kronoj por financi la norvegan parton de la 11a PIF. Sed la komunumo ne financis Esperanton. Ĝi financis internacian teatran aranĝon. Ke oni per tio pretere stimulis Esperanton, — des pli bone por ni.

Spomenka Ŝtimec

INSTITUCIO HODLER '68:

Duoblighi la kapitalon!

PASIS JAM preskaŭ dek jaroj de post kiam notario en Enschede (Nederlando), per akto de 1968 10 28, konstatis, ke s-roj M. Jaumotte, E.L.M. Wensing kaj E.J. Woessink fondis la Institucion Hodler '68, laŭ iniciato de f-ino M. H. Vermaas, kiu poste dum multaj jaroj administris la Institucion.

Kolektiĝis intertempe kapitalo de pli ol 200 000 gld., kiu permesis distribui jam konsiderindajn sumojn el la rento. La fondaĵo neniam tuŝas la kapitalon sed jaron post jaro disdonas la enspezitan renton laŭ la preskriboj de sia statuto, t.e. unuavice al UEA, sed ankaŭ al aliaj personoj kaj instancoj kiuj helpas al la pliintensigo de la uzado de la Internacia Lingvo.

ĈI-JARAJ SUBVENCIOJ DE LA INSTITUCIO HODLER '68

En sia kunsido la 22an de majo 1978 en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, la estraro de la Institucion Hodler '68 decidis jene distribui la renton el la pasinta jaro:

Fondaĵo Canuto	Gld.	2 000,00
Akademio de Esperanto		1 000,00
Eldonejo PLEJADO por la eldono de la libro de V. Lebrun <i>Leo Tolstoj, la homo, la verkisto kaj la reformisto</i>		800,00
Al madagaskaraj esperantistoj por eldono de afrika Esperanto-ligilo		1 200,00
Por propagandi la Pasportan Servon de TEJO en neesperantistaj medioj		1 200,00
Fondaĵo Oficeja Ilaro de UEA		3 000,00
Eŭropa Esperanto-Centro		500,00
Someraj Universitataj Kursoj		500,00
Ĝenerala kaso de UEA		800,00
Sume en guldenoj		11 000,00

La atribuo de la subvencioj komenciĝis en 1971, el la rento de 1970; la disponebla rento kreskis de 7 000 gld. en 1971 al 12 000 gld. en 1977 kaj 11 000 en 1978, entute jam distribuiĝis rento de 64 150 gld.

Plej ofte dum la pasintaj dek jaroj subvenciigis Fondaĵo Canuto (18 700 gld.) kaj la Akademio de Esperanto (6 000 gld.). Sed la helpa mano de la Institucion etendiĝis al plej diversaj instancoj: CO de UEA, *LMLP (LP-LP)*, SUK, Skolta Esperanto-Ligo, Eŭropa Esperanto-Centro, ILEI, Societo por la Internacia Lingvo (FR Germanio), Kastora Klubo, *Heroldo*, CED, Kulturdomo Grésillon (Francio), KER de TEJO, TEJO mem ktp.

Por pli efike helpi al UEA kaj al la monda Esperantomovado, la esperantistaro kontribuu dum la venontaj dek jaroj almenaŭ same multe t.e. 200 000 gld. al la kapitalo de la Institucion. Duobligo de la kapitalo duobligos ankaŭ la renton kaj do la subtenon al ĉiuj projektoj, kiuj plifortigas la Movadon. La donacoj restos por ĉiam parto de la Kapitalo. Ekzistas ankaŭ la ebleco prunti monon kun la minimumo de mil guldenoj (senrenta prunto por periodo sesjara, aŭ kun duprocenta rento por periodo de dek jaroj).

G.M.

Scienco kaj evoluigo

LA MONDA Federacio de Sciencaj Laboristoj sendis al UEA inviton partopreni Simpozion pri la Rolo de Scienco kaj Tekniko en la Ekonomia Evoluigo, kunlige kun la starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo. La Simpozio okazos en Alĝero (9—12a de sept. 1978). Ĝin organizos la Federacio en kunlaboro kun Unesko.

La temoj de la Simpozio estos ĉefe tri: 1) ekonomiaj, sociaj kaj politikaj aspektoj de la Ordo en rilato al la evoluigo de scienco kaj teknologio; 2) aplikiĝo de scienco kaj teknologio al la starigo de la Ordo (precipe en la evolulandoj kaj inkluzive de teknika edukado tie); 3) la rolo de la instancoj de UN kaj de la fakaj sciencaj kaj inĝenieraj organizaĵoj rilate la celojn de la Nova Internacia Ekonomia Ordo.

La Federacio petas mallongajn referaĵojn pri unu aŭ pluraj el la ĉi-supraj temoj. Adreso de la Federacio estas: 40 Goodge Street, London W11 1FH, Britio.

Kalocsay, la kolosa diletanto

LA ELDONEJO Literatura Mondo en Budapeŝto presis en 1939 la unuan post *Streĉita kordo* poemaron de Kalocsay kaj pro la militeksplodo ĝi ne aperis, sed la amaso da disaj oktavoj forputris sur la tera planko de ĝardenbudo. Per hazardo en 1948 saviĝis kvin ekzempleroj, kaj nun laŭ unu el tiuj estas farita ĉi tiu foto-represo kun afabla permeso de la vidvino.

Kalocsay mem ne volis, ke ĝi reaperu ĉar, li asertis, ĉio, kio valoras, jam eliris ie-tie, aŭ senŝanĝe, aŭ re-tuŝite. Nu la granda artisto malpravus, ĉar la tuto, kiel li ĝin fasonis en 1939, havas ja kolektivon sencon, kian ne havas la disaj eroj fajlitaj de lia senripoza mano, kaj la novaj poemoj sidas forte en la ĝenerala kadro.

Tra la poemaro ŝvebas du ombroj: mezaĝo (li tiam estis 48-jara) kaj la nuboj de venonta mondfatalo. *Mi estas tiel laca, kiel la mont' maljuna* li ĝemas, kaj *Pli kaj pli la izolo de ekzilo / min ĉirkaŭfermas* li skribis en la enkondukita poemo. Sed ne mankas tenero, la "malnovaj madrigaloj", nek la plej pura esperantisma poemo en la lingvo, "Kompato". Ĝi troviĝas ĉi tie en sia unua formo, pli mallonga, kaj finiĝanta per Jesuo. (Tiun finon eble diktis la orda ĝardeno de l' Horthy-kulturo.) Poste li estis daŭrigonta ĝin tra Tolstoj kaj Marks ĝis la rigora dekreto pri tiu Kompato:

*Ve, kiuj kontraŭ ĝi deliktas,
al tiuj senkompaton diktas
Kompato,*

kaj laste li modifis ĝin per superba, vasta trakto (trovebla en *Esperanta antologio* kaj *Kremo de Kalocsay*) finiĝanta per la vizia prognozo:

*Kaj siajn frondojn de beato
etendos ĝis la mondekstremo
la cedro el la eta semo
Kompato.*

Troviĝas ankaŭ "Cinikaj sonetoj" unue aperintaj en la gazeto *Literatura mondo* sub pseŭdonimo Alex Kay, kaj je la fino la "Japaneskoj": 'nur etaj kantĉifonoj, splitaj', kiel li preludis ilin.

La princo de nia poezio

Trafe oni nomis Kalocsay'n "la princo de la Esperanta poezio", ĉar kiel princo li patronis kaj donis direktojn per ekzemplo kaj instruo. Ceteraj poetoj, de Schulhof ĝis Boulton kaj Auld, sonis per klare apartaj tonoj, sed ĉe Kalocsay oni aŭdas voĉon polifonian. "Bronza kaj arĝenta" mi nomis ĝin, ĉar Kalocsay prezentis repertuaron de efektoj kaj sonoraj, dum ĉe Schwartz, Baghy, Hohlov oni aŭdas po unu voĉon, ĉu baritonan, helbaritonan aŭ tenoran. Cetere ili ankaŭ modulis siajn voĉojn: sufiĉas legi "La mar' furiozas" de Baghy aŭ "Ajno" de Miĥalski por konstati, kiel varias la tono kaj ritmo laŭ progresa inspiro de la poeto.

Sed Kalocsay volis, ke per li la lingvo kapablu plenan diapazonon. Tion li plej frape demonstris en *Eterna bukedo*, 1931. Tie, por la unua fojo en nia poezio, poemoj el diversaj lingvoj sentigis ne nur malsamajn muzikojn, sed eĉ apartajn tembrojn de la individuaj poetoj. Tio estis ravo, tio estis revelacio kaj vojmontraro por liaj sekvantoj. De tiam oni ne plu povis kontenti pri ia ĝenerala tradukado de poezio laŭ pala pseŭdo-zamenhofa stilo. De tiu momento la lingvo kapablis ĉion: sola limo estos la talento de ĝiaj uzantoj.

La memfarita poeto

Poeto naskiĝas, ne fariĝas, oni diras. Sed fakte ekzistas ambaŭ specoj: Baghy apartenis al la unua, Kalocsay al la dua. Oni jam ofte salutis la samtempajn debutojn de ambaŭ en 1921/2 per *Preter la vivo* (B) kaj *Mondo kaj koro* (K). Sed neniu ĝis nun faris la por mi evidentan konstaton, ke la unua superas poezie la duan. Ĉe Baghy oni tuj sentas spontanon poeton, sed ĉe Kalocsay oni, inter kelkaj fortaj pecoj, trovas pli ĝuste hezitajn ekzercojn sen kohera animo. Iliaj sekvaj verkoj tuŝis apogojn. Ambaŭ estis riĉe elokventaj, sed la *Streĉita kordo*, 1931, de Kalocsay jam superis, laŭ larĝo kaj profundo, la *Pilgrimon*, 1926, de Baghy. Ĝi estis tutsimple la plej bona poemaro en la lingvo.

Kiam apud *Streĉita kordo* kaj *Eterna bukedo* aperis *Hungara antologio* kaj la *Infero* de Dante, estis klare, ke Kalocsay, per giganta, izola fortostreĉo jam trenis la tutan Esperantan poezion sur pli altan ŝtupon. Per sia duflanka laboro, originala kaj traduka, li dotis nian lingvon per potenco kaj prestiĝo ĝis tiam nekonitaj.

Oni do konstatas, ke Kalocsay, esence lingva artisto, vestis sepmejlajn botojn por fari sin poeto, kaj eĉ kredis, ke ankaŭ aliaj povos fari simile, sekvante lian

STATUETO DE KALOCSAY?

La vidvino de la forpasinta grandulo de la Esperanta kulturo skribis al ni jenon:

"Antaŭ kelkaj jaroj vizitis mian edzon eksterlandanoj — mi ne scias en kiuj lando kaj urbo — kaj ili rakontis, ke pri Kalocsay ie troviĝas statueto (eble en Bern?)... Kiu scias pri tiu statueto? ... Mi dezirus akiri foton pri ĝi."

Niaj legantoj, kiuj scias iun detalon pri la ekzisto de statueto aŭ busto de Kalocsay, bonvolu skribi al nia revuo aŭ rekte al s-ino Kalocsay, adresante siajn leterojn jene: **Kalocsay Kálmánné, Nyul u. 4, H-1026 Budapest, Hungario.**

ekzemplon. Ja ne tute ŝercaj estas la subtitolo de *Parnasa gvidlibro*: 'kiel fariĝi poeto', kaj la devizo 'Ni donas ĉion krom genio'. Kaj en *Izolo* lia rekta konfeso en la "Jubilea letero al Julio Baghy" estis ne modesto, sed simpla sincero:

*Sed mi neniam volis esti bardo,
kaj se en mia koro estis ardo,
ĝi estis por la lingvo: mi ĝin volis
prepari, perfektigi por genio
post mi venonta.*


Ke li tamen fariĝis bardo suverena, aperos en plena dimensio nur tiam, kiam ni, konstatinte ke nia kulturo estas komuna fando de originaloj kaj tradukoj, povos legi *Tra la ŝtormo* kaj la pretan parton de *Tutmonda sonoro*. Sed por Kalocsay ia nova provoko aŭ ekzerco foje pli valoris, ol la enhavo: ne nur li povis turni sian bekon laŭ la vento, jen tradukante *Vivo de Arnaldo* de Mussolini okaze de la roma UK en 1935, jen laŭdante dumilite Churchill, Roosevelt kaj Stalin laŭ la okazo kaj poste verkante proletajn poemojn, sed li ankaŭ arbitre ŝanĝis poemojn de aliaj, rompante kelkfoje ilian karakterizan tembron. Sufiĉas kompari "La amatoj de l' stelo" de Emba en 1) *En ekzilo*, 1938, kaj en 2) la postmorta *Ekzilo kaj azilo*, 1962. Ke kulpis tion ĝuste Kolomano, kiu en *Eterna bukedo* interpretis plej diversajn voĉojn, estas apenaŭ kredeble.

1) La amatoj de l' stelo

*Kun ĉiuj mil doloroj de l' infero
Baraktas ni en marĉoj de la tero:
Piedojn akre tranĉas fera bot',
Kaj ŝultre mil malbenoj premas
Nin al la senmezura kot'.*

*Ĉi koton ni eterne knedas, plugas,
En altojn nur la kaŝaj pensoj flugas,
Sed tra milionmeĵla noktmalhel'
Ja tamen, tamen, serĉas nin, turbulojn
El sia alta tron' la stel'.*

Kiam mi plendis, ke en *Vesperkanto* (1967) de Hendrik Adamson li grave ŝanĝis plurajn pecojn, eĉ donante al la aŭtoro la neologismon 'svaga' kreitan 20 jarojn post lia morto, Kalocsay respondis, ke ankaŭ la fruajn versojn de Adamson li reverkis por *Dekdu poetoj* (1934), ĉar ili estis 'nekredeble primitivaj, sed li havis kelkajn bonajn ideojn'! Do jen el nepoeto li fabrikis poeton, kaj la brava estono iris kun falsita pasporto en la Esperantan panteonon.



La eterna antaŭsalto, Progreso

Vere, ke revizianta li ankaŭ ne indulgis sin mem. En tio oni vidis ŝanĝojn foje modajn. Dum certa fazo li uzis, sprite kaj trafe, 'misa' por malbona: tio estis des pli oportuna, ke ĝi uzeblis ankaŭ prefikse:

La misknabinoj loĝas en mallum' embuska
(Köstolányi),

sed kiam li transiris al 'mava', tuj 'misa' ĉesis aperi, iel kontraŭ la normala procezo de paralela uzo kaj progresivaj ŝanĝoj. Kaj simile estis, kiam li decidis apliki pedante la artikolon, kiu devas ja dependi de neceso kaj sufiĉo. Tiu nova rigoro jam faris domaĝon en la tralaborita *Johano la Brava*, kaj eĉ pli ĉe Petöfi inter *Hungara antologio* (1933) kaj *Libero kaj amo* (1970). Jen ekzemple la komenco de "Valo kaj monto":

1933: *Se mont' mi estus! (Valo ĝeme diris.)
Se mont' mi estus! Ho, kia plezur'
Estas rigardi tra la granda mondo,
Najbare al la steloj, en lazur'!*

Ŝajne pekis la senartikolaj 'Valo' kaj 'lazur'', do en 1970 ni trovas:

*Se monto estus mi! (La val' suspiris.)
Se mont' mi estus! Kia dia sento
estus rigardi tra la mondo granda
el najbarec' de l' stela firmamento.*

2) La amatoj de la stelo

*Kun ĉiuj mil doloroj de l' infero
baraktas ni en marĉoj de la tero,
en ties senmezura nigra kot',
kaj se nin lac' faligas,
por plua pen' instigas
aŭ nin en koton premas fera bot'.*

*Ĉi koton ni eterne knedas, plugas,
kaj sole timaj, kaŝaj pensoj flugas
al la mallum' funebra de l' ĉiel',
sed scias ni: emergos,
nin amas ja kaj serĉos
la stelo. tiu sava stel'*

La plibonigemon entute mi ne kritikis. Ĉe *La tragedio de l' homo* (1926 kaj 1965) la tralaboro ellevis la tradukon al plena moderna elokvento kun senmanka profito.

Decas do, ke ni konsideru la nun prezentatan *Izolon* en tiu pli larĝa kadro, kiel dokumenton el certa etapo en la evoluo de Kalocsay. Oni tamen ne bezonas esti kaloĉajologo aŭ historiisto por ŝati ĉi tiun poemaron. Ĝin oni povas ĝui tuj kaj senpere.

Restas noti du detalojn: Sur p. 59 mankas supersigno ĉe 'Ĝardene', kaj — stranga glito! — sur p. 72 'Inter malbon' kaj miso' devas esti 'Inter la bon' kaj miso'.

Reto Rossetti

Mendu ĉe UEA: *IZOLO* de K. Kalocsay. Rotterdam: UEA, 1977. 77p. 18cm. Bindita, kun ŝirmkovrilo. ISBN 92 9017 020 4. Prezo: 16,50 (por Nederlando 17,16) gld., plus sendokostoj 10%.

Kion diris M'Bow en Lucerno?

En nia maja numero (p.90) aperis informo pri diskuto, kiu sekvis la prelegon de A.M. M' Bow en la 13a monda kongreso de fremdlingvaj instruistoj, la 30an de marto 1978 en Lucerno. Jen nun koncizigita formo de tiu grava kaj interesa elpaŝo de la ĝenerala direktoro de Unesko.

VIA INVITO, ke mi parolu al vi pri lingvaj problemoj en multlingvaj socioj, estas mem indiko pri tio, ke vi interesiĝas pri iuj demandoj ofte neglektataj. En multaj landoj tiuj temoj estas gravaj ne nur kulture kaj eduke, sed ankaŭ politike, socie kaj ekonomie. Efektive, ili estas tiel multnombraj, ke mi preterlasos tiujn temojn, kiuj apartenas al la pure lingva fako, kiun vi reprezentas, kaj pritraktos nur kelkajn el la ĉefaj aspektoj de la tri lastaj temoj de via tagordo.

Unue necesas konstati, ke plurlingvaj socioj estas ne escepto, sed preskaŭ normalaĵo. Jam de la unua tempo, kiam homojn disigis geografiaj baroj, aŭ, foje, etnaj kaj politikaj diferencoj, kiam homoj migris — ĉu proprave, ĉu devigite, dum paco aŭ dum milito — de unu kontinento al alia, aŭ el lando malsata al lando prospera, aŭ (kiel lastatempe) el la kamparo al la urboj, la mito de Babelo — por tiel diri — eniris en la vivan realaĵon de la granda plimulto de landoj tra la mondo. Se tiu situacio ne ĉiam estis evidenta, estas pro tio, ke ofte malklarigis ĝin diferencoj en la kondiĉoj de evoluo. En la plej industriigitaj regionoj, multaj ŝtatoj donas la impreson, ke ili vere atingis lingvan unuecon. Sed en la plimulto de kazoj tio estas la rezulto de longa historia proceso, en kiu unu lingvo sukcesis forŝovi aliajn. En Francio, ekzemple, la malrapidan kaj iom-post-ioman triumfon de la *langue d'oïl* sekvis ĝenerala centriĝo, al kio kontribuis tiel la absoluta monarkio kiel ankaŭ la fakto, ke la jakobenoj unuigis la popolon pere de unu komuna lingvo, iom post iom forpuŝante la ceterajn popolajn dialektojn kaj regionajn lingvojn.

Fine, la "volo kunvivi", laŭ la esprimo de Renan, superis la emon al lingva aparteco, kvankam tiu lasta forto ankoraŭ neniel estas elĉerpita. Sufiĉas atentigi pri tio, kiel firme sintenas la eŭskera kaj kataluna lingvoj ambaŭflanke de la landlimo inter du ŝtatoj, kies lingvoj apartenas al la plej vaste parolataj de la mondo; aliaj ekzemploj estas la pluvivo de la kimra en Britio kaj la reviviĝo de la gaela en Irlando. Se temas pri Francio, sufiĉas montri al la revigliĝo de la bretona kaj korsika lingvoj.

Apartan konsideron postulas tiuj landoj, kiuj oficiale estas plurlingvaj. Ĉe ili tuj aperas ŝajna kontraŭdiro. Unuflanke, ĉiuj lingvoj estas egale dignaj, ĉar ĉiu el ili

estas la plej profunda esprimo de ĉiuj elementoj, kiuj konsistigas popolon aŭ la kulturan personecon de iu popolgrupo. Aliflanke, inter tiaj popoloj aŭ grupoj, ofte ekzistas granda malegaleco inter unu lingvo kaj alia. Ekzistas landoj kiel tiu, kie ni nun gastas, kie pace kaj pozitive kunezistas tri lingvoj, esprimiloj de antikvaj kulturoj, el kiuj ĉiu asimilis la teknikan progreson de nia epoko; sed kiom da aliaj ekzistas, en kiuj la lingvoj rivalas inter si kaj iuj el ili, konfesinde, devas akcepti malsuperan pozicion. Fakte, kio kutimas okazi estas, ke la koncernaj lingvoj plenumas malegalajn sociajn funkciojn, precipe kiam nur unu el ili havas la rangon de skriba lingvo.

Sed ĉi tiu listo de malhelpoj por iuj lingvoj estas tute ne kompleta. Ekzistas kelkfoje tre grandaj sociaj kaj ekonomiaj fortoj kiuj kaŭzas, ke kontraŭ unu "moderna" vaste parolata lingvo luktas, se ne intence, tamen ja efektive, alia vaste parolata lingvo. Ekzistas, ekzemple, lingvoj kun skriba formo jam de jarcentoj, kun plurdekmiliona parolantaro, kiuj tamen estas neadekvataj por komuniki modernan sciencan pensadon kaj la kontribuon de la teknologia civilizo; tiaj lingvoj devis barakti kontraŭ la konkurenco de lingvoj "importitaj".

Kvankam nekompletaj, ĉi tiuj komentoj sufiĉas por montri kiel kompleksaj estas la lingvaj problemoj de plurlingvaj socioj, ĉu en evoluintaj ĉu en evoluantaj regionoj. Inter ĉi tiuj problemoj troviĝas unu, kiun mi jam tuŝis pretere, sed kiun mi ŝatus ankoraŭ trakti ĉar



La Akvo-Turo kaj Kapel-Ponto estas simboloj de Lucerno en kiu ankaŭ la 64a UK en 1979 traktos la lingvo-problemon.

ĝi miaopinie havas fundamentan gravecon: temas pri la risko de antagonismo inter la certigo de kultura identeco kaj la postuloj de socia kaj ekonomia evoluo.

Plurlingvismo estas nur unu specifa ekzemplo de kultura plurismo, kiu baziĝas sur la demokrata principo de reciproka respekto al la personeco de la individuo kaj ties rajto konservi sian identecon sen puno per ostracismo. Cetere, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, akceptita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en 1948, proklamas ke "Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturen vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciencon progreson kaj ĝiajn fruktojn." Simile, la Deklaracio de la Principoj de Internacia Kultura Kunlaboro, kiun akceptis la Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1966, asertas ke "ĉiu kulturo havas siajn respektendajn kaj konservendajn dignon kaj valoron". Fakte, kultura diverseco interne de lando povas konsistigi grandiozan fonton de riĉaĵoj, se oni konsideras, ke gravas ne nur protekti riĉan heredaĵon de scioj, spertoj kaj valoroj — kiu mortus, se oni ne integrigus ĝin en la modernan evoluoprocezon —, sed ankaŭ flegi kontaktojn kiuj povus esti ege produktivaj por ĉiuj koncernatoj. La rapida disvastiĝo de la amasaj komunikrimedoj faras ĉi tiun taskon eĉ pli urĝa. La amasaj rimedoj, kiuj estas inter la ĉefaj kanaloj de kultura komunikado, transdonas mesaĝojn kiujn oni ne supozu kulture neŭtralaj, ĉar ili spegulas la pensadon, valorojn kaj, resume, la mondbildon de la komunikantoj. Kiam ili, kun sia kutima efikeco, peras al difinita lando aŭ regiono valuesistemojn fremdajn al ties popoloj, la komunikrimedoj riskas fariĝi, vole-nevole, iloj de kultura fremdiĝo.

Kaj tamen — kaj ĉi tio estas dua aspekto de la problemo — estus, miaopinie, nedezirinde subteni stagnadon kun la preteksto protekti kulturon aŭ lingvon dum periodo, kiam tiom da popoloj devas utiligi la rimedojn, kiujn provizas la modernaj scienco kaj teknologio, eĉ se nur por kontentigi la plej bazajn postulojn pri nutraĵo, ŝirmo kaj higieno. Per ĉi tio ni venas al konsidero substanta kaj konsidero formala, kio mem estas iugrade konsidero lingva.

La substanta konsidero estas tio, ke la aplikitaj sciencoj kaj teknologio, same kiel la amasaj komunikrimedoj, ne estas kulture neŭtralaj, ĉar ili tre ofte spegulas la vivmanieron de la socioj, kiuj ilin produktis. Por konservi la karakteron de popoloj, estas do necese certigi, ke evoluo kvazaŭ venas de interne, por ke la enkonduko de scienco kaj teknologio okazu en maniero, kiu ŝirmas la kulturajn tradiciojn kaj profundajn valorojn de la ricevanta socio, rilate iliajn progresemajn aspektojn.

La formala konsidero estas tiu, kiu fontas el la neegalaj gradoj de evoluo de la koncernaj lingvoj. Tiu neegaleco ŝajnus pravigi du specojn de agado. La unua estus "modernigi" la malpli evoluantan lingvon, tiel ke ĝi asimilu la sciencajn kaj teknikajn konceptojn, kiuj estis ĝis tiam fremdaj al ĝi.

La dua speco de agado rilatas edukadon. Dum la lasta dudeko da jaroj, spertoj de tiuj plurlingvaj landoj kun la plej grandaj malfacilaĵoj — tio estas la landoj, kiuj

intertempe liberiĝis de koloniismo — lernigis al ni duoblan lecionon. La unua leciono estas, ke edukado, kiu venas al la infano dekomence en lingvo tute fremda, ne ĉiam donas bonajn rezultojn kaj oni eĉ povas diri, ke la rezultoj estas tre ofte malbonaj. Tia edukado ne nur faras limigojn tiel severajn, ke konsiderinda eduka malŝparo rezultas, sed ĝi ankaŭ subtenas kulturen fremdiĝon kaj socian disrompon. Pro tio devus ĉiam esti la regulo uzi la gepatran lingvon dum la unuaj lerneaj jaroj, malgraŭ la obstakloj foje konsiderindaj; multaj landoj ankoraŭ ne superis ilin.

La dua leciono ĉerpebla el pasintaj spertoj estas, ke en la plej multaj plurlingvaj landoj uzo de lingvo alia ol la gepatra necesas por instruado je la meza nivelo kaj eĉ pli je la universitata nivelo; ĉi tiu lingvo estu prefere mondvaste uzata. Tia estas la neevitebla kompromiso, akceptenda dum ankoraŭ longa periodo kaj en tre multaj kazoj, inter la bezono konservi kulturen specifecon kaj postulojn de la moderna progreso.

Kvarlingva aero

ESTONTECE, la angla lingvo devos dividi sian privilegian pozicion kun tri aliaj lingvoj en la Komisiono pri Aernavigado de Internacia Civil-Aviada Organizo (ICAO), unu el la specialigitaj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj. Tiel montriĝas el unu el la rezolucioj akceptitaj dum la 22a kunsido de la Ĝenerala Asembleo de ICAO, fine de 1977 en Montrealo. (La tekston de la rezolucio ni sukcesis havigi nur nun).

Kiel povis batiĝi tia breĉo en la solida uson-angla bastiono sur la kampo de la internacia aviado? Nu, laŭ ĉiuj reguloj kaj proceduroj de ICAO, ankaŭ la Komisiono pri Aernavigado devas konformiĝi al la parola kaj skriba uzado de kvar laborlingvoj, nome la angla, franca, hispana kaj rusa. Post la funda esploro de la lingva situacio en ICAO kaj UN ĝenerale, la Konsilantaro de ICAO trovis, ke ĉiuj dokumentoj de la menciita Komisiono estas preparataj kaj distribuataj nur en la angla. Sekve, la Ĝenerala Asembleo ordonis, per nemisinterpretebla instrukcio, korekton de tiu praktiko, kiun ĝi stampis ne nur kontraŭregula, sed rekte malutila al la membroj de la Komisiono kaj al la naciaj instancoj, kiuj volas profiti la laborojn de ICAO.

Interesaj estas, tamen, la paradoksaĵoj inter, unuflanke, la konsidero, ke konsekvenca plurlingvigo de la Komisiono montriĝis ebla sen malekvilibrigi la buĝeton, kaj, aliflanke, rekomendo pri pli severa kontrolo de la elspezoj por ĉiuj lingvaj servoj en ICAO, aliloke en la rezolucio. Oni ne povas ne konsenti kun la principo de lingva egalrajteco (eĉ se temas pri nuraj kvar), sed, ĉu ICAO vere studis ĝisdetale ĉiujn funkciajn kaj financajn implicojn de multlingveco, kiel oni asertas en unu el la rezoluciaj prikonsideroj? Cetere, laŭ alia UN-dokumentoj, en 1976 ICAO elspezis 4 milionojn da dolaroj por siaj lingvo-servoj, kio estis pli ol kvarono de ĝia tiujara buĝeto.

whj

Fervojistoj en la itala metropolo

Kvankam inter la plej malnovaj (fondita en 1909) fakaj asocioj, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) daŭre imponas kiel la plej amasa (2816 membroj) faka Esperanto-organizaĵo. IFEF ŝajne estas ankaŭ alispeca ekzemplo: ĝi tre intime kunlaboras kun nemovadaj fakaj instancoj kaj institucioj. Ĉio ĉi evidentiĝis plian fojon en la 30a Kongreso de IFEF, meze de majo en Romo.

LA 30a IFEF-Kongreso allogis 350 fervojistojn el 18 landoj vojaĝi al Romo por inter la 13a kaj 20a de majo praktiki amikecon, fakte diskuti kaj konatiĝi kun la vidindaĵoj de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Por atentigi la publikon pri tiu evento — malfacila tasko en tiom granda urbo — oni sukcesis aranĝi programojn en la loka televida stacio "Antenna 4" kaj sep debatojn en alia televida stacio "Teleroma 56". Afiŝoj itallingvaj fare de provinca unuiĝo el 3 sindikatoj troviĝis ĉirkaŭ la stacidomo Termini, apud la kongresejo "Domus Pacis" kaj ĉe la teatro "Universal", kie okazis vespera programo. Krome, pluraj gazetoj raportis, eĉ kun bildoj.

La inaŭguro estis solena kaj distra. Bonvenige salutis LKK-prezidanto, d-ro Alberto Menabene. Bondezirojn esprimis la ĝenerala sekretario de FISAIC (Internacia federacio de kulturflegantaj fervojistoj) Friedrich Knop el FR Germanio, d-ro Mario Cavarni nome de Dopo-lavoro Ferroviario, la itala sekcio de FISAIC, senatano Alberto Del Nero, prezidanto de la novfondita interparlamentara grupo "Amikoj de Esperanto", d-ro Francesco Monopoli nome de la ĝenerala direkcio de la Italaj Ŝtatfervojoj, kaj pluraj aliaj oficialuloj. Infanoj de la lernejo Oltresavio en Cesena, kie oni de multaj jaroj instruas Esperanton, plaĉe kostumitaj, prezentis vigle kaj memfide skeĉon. Poste salutis reprezentantino de la respubliko San Marino, la redaktoro de "Heroldo" kaj po unu reprezentanto de la diversaj landoj. D-ro Ferenc Phersy, Hungario, salutis ankaŭ nome de UEA, por TEJO salutis ties ĝenerala sekretario Brunetto Casini. Plej grandan aplaŭdon rikoltis Akira Shibata el Japanio, ĉar unuafoje du japanaj fervojistoj ĉeestis IFEF-kongreson. Fine la prezidanto de IFEF Joachim Giessner rekomendis en sia malferma parolado okupiĝon pri Esperanto por kompensi la kreskantan komputerizon de nia mondo.

La estraro kaj komitato de IFEF diskutis dufoje pri budĝeto kaj kongresproponoj antaŭ ol voĉdoni pri ili

en la plenkunsido; la Komisiono pri Varbado kaj Informado kunsidis dufoje, kaj la Fakprelega Komisiono diskutis pri la preparoj de la ĉi-jara prelego kaj jam pri la venontjara. La fakprelego mem, klarvoĉe kaj sperte prezentita (inter du sonfilmoj) de d-ro Antonio de Salvo, temis pri "La rekta fervojo inter Romo kaj Florenco", kun detalaj informoj kial necesis tiu kvara linio inter la du urboj, kiujn teknikajn malfacilaĵojn oni kiamaniere venkis, kiuj partoj jam funkcias, kiam oni finos la laborojn, kian tempogajnon la trajnoj havos, kiaj signaliloj sekurigos la veturadon ktp. Ankaŭ la du sonfilmojn fervojajn, unu pri la sama temo, d-ro de Salvo bonege komentariis en Esperanto. Domage, ke la sekvanta bildserio pri Radio Vatikano forprenis tiom da tempo, ke la lasta programero, diapozitivoj de la japanaj kolegoj, kiuj deĵoras sur la fama Tokaido-ekspreso, ne plu trovis la dezirindan atenton.

La Terminara Komisiono kunsidis eĉ trifoje kaj decidis pri la plej trafaj tradukoj por terminoj, pri kiuj la antaŭa korespondado ne kondukis al interkonsento. Surprizis la sciigo, ke la Japanaj Ŝtatfervojoj eldonis paralele la seslingvan leksikonon de la Internacia Fervojunio (kiu estas la bazo de la terminara laboro de IFEF), anstataŭinte la nederlandan lingvon per la japana. Alia novaĵo: la kunlaboranto en Finnlando, Nils-Gösta Narvala, alportis tradukon de ĵus aperinta fervoja tarifdokumento, nome la Komuna Internacia Tarifo por la Transporto de Pasaĝeroj kaj Pakaĵoj (TCV), Kajero I "Ĝeneralaj Transportkondiĉoj".

Pri la Forumo, la tradicia kongresa okazo eldemandiĝis pri la gastiganta lando, menciindas precipe la partopreno de sindikatano Sante Bianchini. Lia organizo SAUFI intencas rekomendi la adopton de Esperanto en la Internacia Federacio de Transport-Laboristoj (ITF).

La distraj programeroj abundis apud la laboroj: promonado tra la ĝardenoj de Vatikano, kun halto ĉe ties fervoja stacio, vizito al la famaj muzeoj, internacia balo. La teatra vespero fariĝis vera plezuro: la geknaboj el Cesena ludis du teatraĵojn; kostumoj kaj deĝoro estis memfaritaj; la lingvouzo senartifika kaj sprita. Antaŭe ili kantis en Esperanto; en la paŭzo Gianfranco Mollekatis, samtempe ludante gitaron kaj buŝakordionon; akordiona orkestro fervojista ludis muzikaĵojn de Rossini, Mascagni kaj Auber. La solena ejo donis konvenan kadron por honoro meritplenajn veteranojn: Pierre Poly (Francio) kaj Johann Brüger (Aŭstrio) fariĝis honoraj membroj de IFEF.

Realigis nur du el tri projektoj por la tuttaga ekskurso: kelkaj aŭtobusoj veturis al Tivoli kaj la Vilao d'Este kun ĝiaj famaj fontanoj kaj belega parko. La plimulto sekvis la spurojn de la etruskoj en Cerveteri kaj Tarquinia, por konatiĝi kun la mortulkulto de tiu gento: elfositaj estas kompletaj loĝejoj plurĉambraj, pentraĵe ornamitaj, kie valoraj aldonitaĵoj certigas, ke la mortintoj postmorte havu ĉion bezonatan je sia dispo. Laŭ mi, sole tiu ĉi ekskurso jam valoris la vojaĝon al Romo. Pli ol cent senlaculoj postkongresis en Napolo.

Gernot Ritterspach

Kompenso de jarcentaj kulpoj

Recenzas M.H. Saheb-Zamani (Irano):*

Je la flanko de la Profeto de Italo Chiussi (1919-1973). Antverpeno: TK, 1978. 362p. Ilus. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 12. ISBN 90 6336 003 7.

Italo Chiussi, islamologo kaj majstra tradukinto de *La Nobla Korano*, jen verkis alian valoran libron pri la islamo, por helpi al la okcidentanoj kaj la resto de la neislama mondo konatiĝi kun Mahometo kaj la islama kulturo pere de la Internacia Lingvo. *Je la flanko de la Profeto* estas enkonduko al la rekta kono de la islama ĉeffonto kaj ĝi malfermas la pordon por pli bone kompreni la sanktan libron de islamanoj *La Nobla Korano*.

La nova libro de Chiussi dividiĝas en tri partojn, kiuj laŭvice traktas i.a. jenajn temojn: 1) Objektivaj baroj inter la Okcidento kaj la islama Oriento; miskonceptoj



Italo Chiussi:
Lia nova verko estas elstara ponto inter Oriento kaj Okcidento.

en la Oriento kaj Okcidento pri la islamo, ktp. 2) Socihistoria perspektivo de la islamo; analizoj de la personeco de la Profeto kaj de lia verko; la marŝo kaj venko de la islamo. 3) Sistema elekto de islamaj tradicioj pri la fundamentoj de la kredo, familio, socio ktp., por faciligi la komprenon kaj analizi la enhavon de *La Nobla Korano*, kiel antaŭdirita idealo de la religia kredo de kvinona parto de la homaro.

* Ĉi tiu teksto estas tre koncizigita versio de ampleksa persilingva recenzo por nacilingvaj periodaĵoj, kiun por niaj bezonoj afable tradukis s-ino Ĵila Sadighi-Saheb-Zamani.

Bedaŭrinde, malgraŭ multnombraj verkoj, speciale dum la lastaj jarcentoj, la vera esenco de la islamaj instruoj restas ankoraŭ nekonata en la Okcidento. La plej disvastigita "kono" de meznivela okcidentano pri la islamo, sarkasme, sonas jene: "Islamanoj/mahometanoj ne manĝas porkaĵon kaj edziĝas kun kvar virinoj loĝantaj en haremo"!

La malhavo de ĝustaj scioj pri la islamo en la Okcidento ŝajnas al ni nuntempe almenaŭ grandega manko, tre grava malprofito de la okcidenta kulturo. Tio estas la ĉeffonto de multaj miskomprenoj kaj antaŭjuĝoj, rolas kiel neimageble granda baro inter la Oriento kaj Okcidento por kompreni unu la alian. Islamanoj ofte demandas sin, kiel la scienco de la okcidentulo, kiu inspiras kaj klopodas akiri la tre etajn scierojn pri la plej malproksimaj astroj, povas ankoraŭ resti tiel indiferenta, malsciema pri la fundamentaj konceptoj de iu sistemo de homaj, ekonomiaj kaj juraj interrilatoj, kiu dum 14 jarcentoj konstruadis kaj plukonstruas bazon de unika civilizo en la homara historio. La manko de adekvataj scioj pri la islamo en la Okcidento havas minimume kvar kialojn:

1. Malamika sinteno de la mezepoka eklezio kaj de la instigantoj de la krucmilitoj.
2. Kultura fiersento, etna pluskomplekso, ekonomia avareco kaj fortega koloniisma ardo de modernaj, agresemaj — certe ne ĉiuj — elementoj de la Okcidento. Tiuj elementoj ne nur malhavis intereson ekkoni la valorojn kaj mondkonceptojn — ĝustajn aŭ malĝustajn — de la kolonioj, sed ankaŭ klopodis eldetruigi ĉiujn ajn trajtojn de tiuj popoloj, en la nomo de disvastigo de la plej supera civilizo okcidenta!
3. Suprajaj, rapidegaj ekkonoj de okcidentaj ĵurnalistoj, kiuj, pro urĝaj profesiaj postuloj, manko de bazaj islamologiaj kaj etnografiaj scioj, lingvaj baroj ktp., ne komprenante la esencon kaj kuntekston de iu ajn okazaĵo aŭ tradicio, vidas nur la ŝajnon kaj tuj interpretas ĝin laŭ siaj nominalaj ŝajnvaloroj. Ili do ne nur malhelpas la veran interkomprenon de islamanoj kun okcidentanoj, sed ankaŭ ofte kaŭzas multajn tre malagrablajn miskomprenojn, danĝerajn klaĉojn, falsajn onidirojn kaj malutilajn antaŭjuĝojn.
4. La manko de arda misia spirito, propagandaj organizaĵoj kaj fundamentaj verkoj, dokumentoj, eldonaĵoj ktp., fare de islamaj aŭtoritatoj mem, por rekte kaj ĝuste prezenti la esencojn de la islamo kaj ĝiaj kulturaj atingoj al neislamanoj en la ĉeflingvoj de la Okcidento. En la dua parto de *Je la flanko de la Profeto*, apogante sin al la verso korana "Vere mi estas nur homo, kiel vi. . ." (NK 18:15), Chiussi plenzorge montras, ke Mahometo, kiel ĉiuj aliaj homoj, nature naskiĝis, vivis

kaj fine forpasis. Tamen, li deklaris grandan mesaĝon, realigis ĝin mem, kreis kaj gvidis unu el la tre malmultaj gravaj universalaj movadoj tutsole. Unuvorte, Mahometo, sen retorika troigo, estas unika. Chiussi argumentas jene: li estas unu el la kvin plej gravaj religiaj estroj de la mondo; lia leĝsistemo estas unu el la tri fundamentaj tipoj de la homa juro; li dum tre mallonga tempo, kaj el eta tribo, faris grandiozan imperion; el kvazaŭ nenio li kreis fundamenton de floranta kulturo kaj civilizo; *La Nobla Korano*, la libro de Mahometo, havas ankaŭ altvaloran literaturan kvaliton. . .

En la lasta parto de *Je la flanko de la Profeto* Chiussi zorge kaj pacience travojaĝas en la mondo de Hadisoj — eldiroj de Mahometo, kiujn ne enhavas *La Nobla Korano* — kaj elektante la plej ĝustajn, lasas la islamon unuafoje rekte alparoli tutmonde, esperantlingve. Same kiel en sia traduko de *La Nobla Korano*, Chiussi enmetas la originalajn arablingvajn Hadisojn en unu kolumnon, apud siajn tradukojn.

Por elverki la libron, multaj islamaj kleruloj estis konsultitaj. Pli ol cent referenclibroj kaj artikoloj, orientaj kaj okcidentaj, estis uzataj kiel fontoj de la aŭtoro en liaj serĉadoj dum multjaraj esploroj. Arda pasio, okcident-racia metodo, esplora pacienco, scienca alrigardo, komparema menso, viglaj ĉenideoj, literatura kreivo, hejmeco en la Internacia Lingvo, toleremo, fido kaj — plej grave — sento de tempa urĝo — estadis la ekipaĵo de Chiussi en lia pilgrimo al *Je la flanko de la Profeto*.

Entute, la Okcidento, pere de ĉi tiu libro, klopodas malkovri la esencon de la Oriento ĝis la fundo. La verko de Chiussi estas elstara interkompreniga ponto, sur kiu la Okcidento kaj Oriento, trans ĉiuj antaŭjuĝoj, ektrovas unu la alian. *Je la flanko de la Profeto* inspiras kompensi la jarcentajn kulpojn de la Okcidento.

Mendu ĉe UEA: 33,00 (por Nederlando 34,32) gld., plus sendokostoj 10%.

Koncizo kaj lerto

Recenzas Enrique Balech (Argentino):

Elementa zoogeografio de C. Støp-Bowitz. Lieĝo: Sommeraj Universitataj Kursoj, 1976. 81p. 30cm.

D-ro Støp-Bowitz denove kunigis siajn talentojn kiel esperantisto kaj kiel sciencisto por pliriĉigi la fakan Esperantan libron. Ĉi tiun fojon li okupiĝas pri zoogeografio, la scienco pri la natura distribuo de la animaloj.

La zoogeografio ampleksas kiel la tero mem. Tial estas evidente, ke la plej malfacila tasko de profesoro, kiu devas doni nociojn de tiu vasta scienco en la daŭro de nur kelkaj klasoj aŭ pere de malgranda libro, estas koncizigi la tuton tamen sukcesante prezenti la plej gravajn faktojn en ekvilibra aro. Støp-Bowitz plej bone solvis la problemon. Li ne nur donis la bazajn konojn sed ankaŭ lerte elektis la ekzemplojn, tiel ke ili ilustras la asertojn per okazintaĵoj el la plej diversaj mondregionoj.

Kelkaj observoj: en la paĝo 18 mi trovis dufoje asteriskon sed nenie estas klarigoj. Eble estus konvena pli preciza difino de "stepo", ĉar tiu termino estas tro elaste uzata en diversaj landoj. Oni bonvenigus terminaron en alfabeto ordo.

La recenzanto plene akordiĝas kun la aŭtoro kiam li skribas (p. 62): "Mi ne povas ne cerbumi pri la estonteco" ... Mi dirus "tre proksima estonteco", ĉar la destrudo de la pluvarbaroj, la polucio kaj la ekstermado de specioj tiel rapide progresas (kia progreso!), ke eble la mapo de la biomoj (p. 11) en 30 jaroj fariĝos historia kaj la plej grandaj naturaj arbaroj, tre malgrandigitaj, konsistos nur el eŭkaliptoj, pinoj kaj poploj.

Sume, plia tre bona faka libro de SUK. Preterpase, mi rekomendus tiajn librojn al la ĵus bakita esperantista studentaro en Irano, kiu eble bonvenigus librojn kiuj povus helpi ilin kaj en la studado de Esperanto kaj en tiu de sciencaj fakoj.

Mendu ĉe UEA: 16,80 (por Nederlando 17,47) gld., plus sendokostoj 10 %.

Nietzsche — la paradoksa

Recenzas William Solzbacher (Usono):

Tiele parolis Zaratruŝtra; Libro por ĉiu kaj neniu de F. Nietzsche (1844-1900). El la germana tradukis W. A. Verloren van Themaat. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1977. 366p. 21cm. ISBN 951 9005 40 4.

Nietzsche estis genia filozofo, kiu famiĝis frue kaj mortis frue. Li estis 24-jara, kiam li fariĝis profesoro de la klasika filologio en la Universitato de Basel (Svisujo), 34-jara, kiam li ekŝiĝis el tiu posteno pro malsano (nervoj kaj okuloj), 44-jara, kiam li nekuraceble frenezigiĝis, 55-jara, kiam li mortis. Preskaŭ ĉio en lia vivo kaj liaj verkoj estas paradoksa. Li malestimis moralon kaj volis stari "trans bono kaj malbono", sed liaj frazoj ofte sonas kiel tiuj de predikanto pri severa moralo. Li kondamnis la kristanismon, sed serĉis "Cezaron kun la animo de Kristo". Li konsideris virojn treege superaj al virinoj, sed neniam elpaŝis el la kontrolo de siaj patrino kaj fratino. Lia instruo pri la "superhomo" kaj liaj kontraŭdemokrataj ideoj liveris argumentojn al faŝismo, hitlerismo kaj diktatoraj reĝimoj, sed li kontraŭis la antisemitismon de kelkaj el siaj amikoj, ekzemple Richard Wagner, kaj en 1878 skribis pri la neceseco de internacia lingvo, kiu iam "venos tiel certe kiel ekzistos aerveturado".

En la filozofia-poezia verko, kiun mi nun recenzas, Nietzsche metas siajn ideojn en la buŝon de la persa religia profeto Zaratruŝtra, sed liaj diroj estas la malo de tio, kion predikis la historia Zaratruŝtra. En la postparolo al la germana eldono de 1920, la fratino de Nietzsche citas lin mem pri tiu paradokso. Zaratruŝtra, li diris, estis la unua, kiu vidis en la batalo inter la bono kaj malbono la radon, kiu turnas la historion. Li "tradukis moralon en metafizikon, rigardis ĝin kiel la bazan forton, kaŭ-

zon kaj celon de ĉio... Zaratuŝtra kreis tiun fatalan eraron: la moralon. Tial li devas esti la unua, kiu rekonas la eraron."

La libro ludis rolon en la historio de la filozofio kaj influis la evoluon de la germana lingvo. Eĉ kritika leganto, kiun ŝokas tio, kion la filozofo Karl Jaspers nomis "la monstra aroganteco de Nietzsche", admiras la artan esprimopovon kaj potencon ritmon de la verko. Ĝi estas malfacile komprenebla kaj eĉ pli malfacile tradukebla. D-ro Verloren van Themaat estas lerta kaj sperta pri tradukado. Ĉu li sukcesis en ĉi tiu eksterordinare ambicia kaj komplikita klopodo? Ĝenerale jes, sed ne tute.

Estas iomete danĝere por nederlandano traduki tian verkon el la germana. La lingvoj estas parencaj, sed multaj vortoj kaj dirmanieroj havas malsaman sencon aŭ sub-sencon. Estas iom amuze vidi tion jam en la unua frazo de la traduko, kiu diras, ke Zaratuŝtra forlasis la "maron" de sia hejmlando. La originalo parolas pri "lago". En la unua ĉapitro la "boateto" de Zaratuŝtra fariĝas "barĝo". Sur la lasta paĝo la tradukinto parolas pri "erco", kvankam en la germana poezia lingvo "Erz" ne

F. Nietzsche:
Fundamenta
filozofia verko,
kiun misuzis
lastatempa
historio.



signifas mineralon, kiu enhavas ekstrakteblan metalon, sed la metalon mem: bronzon aŭ feron. Sur p. 188 "ventedzino" devus esti "uragano" aŭ "ciklono".

Sufiĉe ofte frazoj en la traduko estas nekompreneblaj. Sur p. 106 "plebaĉo potenca, skriba kaj voluptaĉa" devus esti "aĉuloj, kiuj misuzas potencon, literaturon kaj volupton". Sur la sama paĝo aperas "bastone rampis al mi blinda l' vivo". Ĉu multaj legantoj divenas, ke tio signifas "malrapide pasis la vivo por blindulo moviĝanta helpe de bastono"?

Preseraroj estas sufiĉe multnombraj, kvankam ĝenerale ne tre gravaj. Sed vere malfaciligas la legadon la fakto, ke oni kompostis la tekston skribmaŝine kaj ke la korektoj estas mallerte faritaj. Eble oni devus konsideri la libron kiel provizoran eldonon, atendante plibonigitan kaj pli facile legeblan en la estonteco. Estas laŭdinde, ke bona esperantisto entreprenis la treege malfacilan kaj temporaban taskon traduki ĉi tiun gravan verkon en nian lingvon.

Mendu ĉe UEA: 42,20 (por Nederlando 43,89) gld., plus sendokostoj 10 %.

Resumo de esploroj

Recenzas G.F. Makkink (Nederlando):

Originoj de la vivo de S. Kawamura. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1976. 61p. Ilus. 30cm.

Ĉi tiu kajero traktas malpli facilan temon ol la antaŭaj libroj de Kawamura. La legado postulas progresintan scion de biokemio. La graveco de ĉi tiu kajero estas ke ĝi kunigas la rezultojn de multaj esploroj kaj donas super-rigardon pri la hipotezoj, kiuj iomete komencas klarigi la komplikitan estiĝon de la vivo. Supozeble la esplora vojo estos longa antaŭ ol ni sukcesos kompreni ĝin tute. La aŭtoro aldonas pli ol kvar paĝojn da sciencaj literaturaĵoj pri la temo, tiel la kajero estas bonega vojonmontrilo al fakulo. La (ne)uzado de la difina artikolo ofte estas devia. Mi bedaŭras, ke ĉe la multaj nomoj de kemiaj substancoj kaj fenomenoj ne estas indikite, ĉu ili estas novaj aŭ jam troveblaj en *PIV* aŭ en iu kemia terminaro.

Mendu ĉe UEA: 13,80 (por Nederlando 14,35) gld., plus sendokostoj 10%.

Sanktulo kiu estas aktuala

Recenzas Giulio Cappa (Italio):

Francisko el Asizo: Profeto por nia tempo de N.G.M. van Doornik. El la nederlanda trad. E.N. Mulders. Romo: IKUE-Centro, 1976. 319p. 17cm.

Francisko el Asizo malfermis novan vojon al la okcidenta mistikismo. Li ne konsideris la korpon kaj la materiajn ŝajnojn ĉefa kaŭzo de peko kaj damniĝo, kiel jam opiniis la ĝistama asketisma tradicio. En la korpo en la tuta naturo Francisko rekonis spurojn de dieco. Lia sinteno al la mondo havis konkretecon neniam spertitan en mezepokaj religiaj medioj. Tial, de post li, konstruiĝis bildo de Kristo revolucie nova, kiu estas pli taŭga por la moderna homo. Tio precipe montriĝas ĉe belarto, kiu ĝuste en la unua duono de la dektria jarcento ĉesis prezenti Kriston kiel triumfantan reĝon, ekkonceptante figuron de suferanto.

Francisko emfazis en kristanismo la religian rolon de malriĉo kaj milda. Tia elstarigo neniam prezentiĝis kiel malfermita ribelo kontraŭ eklezio bezonanta reformon: li elektis la vojon de individua ekzemplo kaj tamen daŭre konservis striktajn rilatojn kun la aliaj homoj. Francisko donacis al naskiĝanta itala literaturo nesuperitan naturkanton, la himnon de la kreitaro, en lingvo simpla kaj popola, kiun riĉa adjektivado provizis per novaj metaforoj.

La libro de van Doornik, tradukita en belan kaj simplan Esperanton, rakontas la vivon de Francisko laŭ religia vidpunkto, plurfoje haltante mediti kia estu la rolo de lia ekzemplo nuntempe. Priskriboj de mirakloj preskaŭ tute mankas, anstataŭigitaj per daŭra laŭdinda

atento al historia kredebleco. Taŭga historia kompreno de la figuro de Francisko estas taksita eĉ nepre necesa por ĝusta utiligo de lia spirita heredo. Van Doornik sugestas, ke ia profetismo, kian Francisko alportis, allogus la modernan junularon: "Ili serĉas tion, kion ankaŭ Francisko serĉis: simplecon, amon, sobrecon kaj honestan klaran politikon en mondo, kiu minacas kaj detruas. Statusa vesto ne plu imponas al ĉi tiu junularo. Sed homo, kiu havas la kuraĝon fordoni ĉion kaj, en eluzitaj vestoj, alvokas la mondon al paco kaj socia justeco, ankoraŭ rajtas paroli al ili pri Dio kaj la evangelio, sen ricevi de ili riproĉojn pri la mankoj de l'eklezio". Francisko – trobadoro, vagabondo kaj "dia frenezulo" – estas figuro, kiu vekas simpatian ankaŭ ekster la religia kadro, ĉar efektive li apenaŭ implikeblas en la subpremaj flankoj de eklezia povo.

Sankta Francisko; Poeziaĵoj de Sergiusz Riabinin (1918 –). Trad. el la pola Szymon Wejland. Romo: IKUE-Centro, 1977. 148 p. Ilus. 21 cm.

Temas pri liberversaj preĝoj, kies plej rimarkebla stila trajto estas insistaj laŭvicaj elnomadoj kaj enumeracio. Agrablaj modernstilaj desegnaĵoj ornamas la tuton. Ĝenerala tezo estas prezento de Francisko el Asizo kiel protektanto de naturamantoj, iaspeca ekologia sanktulo.

Mendu ĉe UEA: *Francisko el Asizo* 18,60; *Sankta Francisko* 13,80 (por nederlando 19,34 kaj 14,35) gld., plus sendokostoj 10%.

Kalendaro

Septembro

- 01-15 Nigramara E-Feriado, Nesebar, Bulgario (Distrikta Komitato de BEA, pk. 30, Smoljan)
- 02-06 49a Itala Kongreso de Esperanto, Cesena (G. Taddei, Via P. Giordani, I-47023 Cesena)
- 02-09 10 Internaciaj Ferioj en Maria Alm, Aŭstrio (Monda Turismo, Stieberg. 6/22, A-1150 Wien)
- 03-16 15a Internacia E-feriada "Ora Pola Aŭtuno", Miedzygórze, Pollando ("Juventur", Jagiellońska 12, PL-85-067 Bydgoszcz)
- 08-10 Internacia Foir Renkonto, Plovdiv, Bulgario (Pk. 184, BG-4000 Plovdiv)
- 10 3a Internacia Pilgrima Kunveno Esperantista, Banneux, Belgio (L. Bourdon, 7 av. Salomon, F-59000 Lille, Francio)
- 15-29 Nigramara E-Feriado, Nesebar, Bulgario (Distrikta Komitato de BEA, pk. 30, Smoljan)
- 29-01 10 12a Kultura Semajnfino, Blieskastel-Niederrurzbach, FRG (Franz-Schubert-str. 26, D-6602 Dudweiler)
- 30-01 10 20a Kataluna Esperantista Renkontiĝo, Tortosa, Hispanio (Centro de Esperanto Sabadell, Apartat 407, Sabadell, Barcelona)

Rimarko: Tio ĉi estas parta kompletigo de nia marta rubriko. Daŭrigo aperos en la oktobra numero.

Laste aperis...

En maskobalo, Julio Baghy (1891-1967). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. 141p. 19cm. ISBN 963 571 003 8. Kvin unuaktaĵoj. Prezo: 13,20 gld.

Marvirina luno (1974), Joan Pomfret. El la angla trad. membro de Morecamba Bay Esperanto-Societo. Morecamba, 1978. 143p. Ilus. 20cm. Romano pri junulino de angla havenvilaĝo en la 18a jarcento. Prezo: 9,60 gld.

Ezopa saĝo (1956), K. Kalocsay (1891-1976). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1978 (fotorepreso). 127p. Ilus. 20cm. 77 fabeloj, verse reverkitaj. Prezo: 14,10 gld.

Fedon; La morto en la filozofio kaj la scienco, Platon (429-347 a.K.). El la antikva greka tradukis Sokratis Sakellaropoulos. Ateno, 1977. 160p. Mimeo. 24cm. Dialogo pri la senmorteco de la animo, kun komentario de la tradukinto. Prezo: 9,60 gld.

Je la flanko de la profeto, Italo Chiussi (1919-1973). Antverpeno: TK, 1978. 362p. Ilus. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 12. ISBN 90 6336 003 7. Klera kaj pia enkonduko al la islamo, kun emfazo je la personeco de ties profeto Muhammad, verkita de la tradukinto de *La Nobla Korano*. Prezo: 33,00 gld.

Marfilo Karlo; Legendo el Kornvalo, Jean Bomford. Coatbridge: Eldonejo Kardo, 1978. 10p. Ilus. Mimeo. 21cm. Libro por Komencantoj 1. ISBN 0 905149 07 6. Knabo amikiĝas kun drako. Prezo: 2,40 gld.

Kantlibro 1976. Kungälv Esperantoklubb, 1976. Multobligita. 15cm. Prezo: 1,50 gld.

Kontaktoj '78. Paderborn: Esperanto-Centro, 1978. 120p. 14cm. Adresaro, kalendaro kaj librolisto.

Libro de la amo, La, Raoul Follereau (1903-). El la franca tradukis Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1977. 61p. Ilus. 20cm. Plejado 5. Humanisma filozofio de la "homo, kiu ĉirkaŭbrakas leprulojn". Prezo: 13,50 gld.

Matenruĝo; La juneco en la tridekaj jaroj, Kazuta Oka. Kioto: L'Omnibuso, 1976. 191p. Ilus. de la aŭtoro. 19cm. Romano pri japana instruisto kiu iom post iom radikaliĝas pro simpatio al koreaj studentoj. Prezo: 22,50 gld.

Opia milito, La, Kompila Grupo por la Broŝuroj pri "Ĉina Moderna Historio". El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1978. 114p. Ilus. 18cm. 11-Es-1375P. Pri la komerco opia inter Ĉinio kaj Britio kaj aliaj okcidentaj landoj en la deknaŭa jarcento. Prezo: 2,40 gld.

Satiroj, F.V. Dorno. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1977 (2a eld.). 140p. 18cm. ISBN 963 571 099 7. Humura novelaro *La aventuroj de L.R.M. Stultulo la X-a kaj la farsa teatraĵo Levu la manojn!* (1939). Prezo: 13,20 gld.

Socia romano en Esperanto, La, Henri Vatré (1918-). La Sagne: Kultura Centro Esperantista, 1973. 17p. Mimeo. 21cm. Studoj 2. Superrigardo kun detalaj analizoj de *Turstrato 4* (1934) de H. Weinhengst, *Metropoliteno* (1933) de V. Varankin kaj *Vojaĝo al Kazohinio* (1958) de S. Szathmári. Prezo: 4,20 gld.

Unua legolibro (1922), Kabe (ps. de K. Bein, 1972-1959). Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1977 (6a eld., fotorepreso de la 5a). 160p. 20cm. Gradigitaj legaĵoj kun frazaro kaj modeloj de leteroj. Prezo: 4,50 gld.

Vitroj; Poeziaĵoj el 1949-1976, Jiří Kořínek (1906-). Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1976. 88p. Multobligita. 20cm. Inkluzivas kelkajn tradukojn. Prezo: 3,60 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,- gld.

Argentino

• Post tre bona propagando en lokaj ĵurnaloj, radio kaj televido, kaj apartaj informaj prelegoj en lernejoj kaj bibliotekoj, en Rosario komenciĝis novaj Esperanto-kursoj, kiujn gvidas Miguel Angel Ruffinengo, Enrique Kohei kaj Nilda de Suarez. Granda grupo de argentinaj esperantistoj, kiuj mem kongresis fine de marto, aliĝis al la Unua Latin-Amerika Kongreso de Esperanto, meze de julio en Brazilo.

Belgio

• En Namur la 17an de junio 1978 okazis "Eŭropa renkontiĝo", organizita de Eŭropa Federista Unuiĝo, belga sekcio. D-ro Pol Denoël, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, estis invitita paroli en la renkontiĝo pri la lingva problemo en Eŭropo kaj pri la solvo, kiun tiurilate proponas Esperanto.

Irano

• La grandega interesiĝo pri Esperanto en Irano ankoraŭ ne atingis sian zeniton. La 3an kaj 10an de junio en la Universitato de Teherano

komenciĝis du novaj kursoj, altigante tiel la suman nombron de la studentoj de Esperanto en la Universitato al 2 750 personoj en 22 kursoj. Ankaŭ en aliaj teheranaj kaj alilokaj altlernejoj anonciĝas ĉiam pli kaj pli da kursanoj: Altlernejo Ŝamiran — 150, Universitato Ferdaŭsi — 150 (tiu universitato en Mashhad ĵus aĉetis Esperantajn librojn por pli ol du mil guldenoj). En la mezlernejoj Haŝtrudi kaj Kejĥosraŭ Esperanton lernas po 90 gelernantoj, dum la lernadon en la mezlernejo Gara-Gozlu partoprenas 25. Koresponda kurso akiris 60 aliĝintojn. Entute dum la lastaj du jaroj en Irano okazis 35 Esperanto-kursoj kun 3 315 partoprenantoj.

Jugoslavio

• Kvankam en la plej suda jugoslava federa ŝtato Makedonio esperantistoj aktivis jam komence de la jarcento, makedonoj ĝis nun restis sen taŭgaj lerniloj de la Internacia Lingvo. Nun fine aperis 284-paĝa *Esperanto-makedona kaj makedona-Esperanta vortaro kun konciza gramatiko*, verkita de M. Galeski kaj Ĝ. Pop-Atanasov. Notinde estas, ke la eldonon financis

nemovadaj institucioj kaj entreprenoj. Antaŭ du jaroj aperis Esperanta traduko de la makedona romano *Ventoj* (B. Ivanov) kaj komence de ĉi tiu jaro publikiĝis *Makedonaj popolaj rakontoj*, ambaŭ ĉe la eldonejo Internacia Kultura Servo en Zagreb, en traduko de Josip Velebit (kaj S. Ŝimuniĉ por la lasta verko).



Hispanio

• "La Esperanto-movado kaj popola edukado en Katalunio 1900 — 1939" estis la temo de bibliografia ekspozicio, kiu inter la 2a kaj 13a de majo 1978 okazis en Barcelono. La ekspozicion organizis studentoj de la Filozofia Fakultato en la Universitato de Barcelono, kiel parton de sia regula studlaboro, sen esti ligitaj al la Esperanto-movado mem. La ekspozicio estis lokita en la biblioteko de la fakultato pri la historio de edukado. Eldoniĝis ankaŭ 24-paĝa ilustrita gvidilo tra la ekspozicio (vidu la foton).

Japanio

• Inter la 14a kaj 18a de majo 1978, en Tokio okazis la 69a jara kunveno de Rotario Internacia, kun partopreno de 39 000 homoj el 83 landoj. En aparta "stando de interamikiĝo" dum tri tagoj rapide elĉerpiĝis konversacia libreto en naŭ lingvoj, inter kiuj estis ankaŭ Esperanto. Krome, oni disdonis specialajn informilojn pri la Internacia Lingvo, precipe al rotarianoj el la landoj kun malforta Esperanto-movado. Japanaj esperantistoj-rotarianoj aranĝis apartan bonvenigan kunvenon por siaj eksterlandaj kolegoj. Ĉiutaga kunvena bulteno dufoje raportis pri tiu esperantista renkontiĝo de rotarianoj.



• Brazilo: En la Jura Fakultato de la Universitato en Campos, ekde la 11a de majo ĉi-jare dudek gestudentoj lernas la Internacian Lingvon. Temas pri eksperimenta klaso, kiu ne estis publike diskonigita, kaj kiu daŭros ĝis la fino de ĉi tiu jaro. Tre verŝajne, se juĝi laŭ la nuna intereso, venontjare komenciĝos tie pli da Esperanto-kursoj. Grandan intereson pri la eksperimento montris ankaŭ la direktoro de la Fakultato, d-ro Carlos Gicovate, al kiu oni ĉe la inaŭgura solenaĵo donacis ekzempleron de "Don Quijote" en Esperanto. La kurson gvidas, laŭ speciala aŭdvida metodo, s-ro Vivaldo Marcelino da Silva.

Parlamenta agado

• En Italio antaŭ kelkaj monatoj fondiĝis parlamenta grupo "Amikoj de Esperanto" (Senato della Repubblica, I-00100 Roma). Ĝi jam nombras 23 deputitojn kaj 21 senatanojn de la Itala Parlamento. La prezidanto de la grupo, senatano Alberto del Nero, parolis en la inaŭguro de la 30a IFEF-Kongreso en Romo (v. p.138) kaj substrekis la neceson kunordigi la iniciatojn de similaj parlamentaj grupoj en aliaj landoj. Post Britio, kie jam dum kelkaj jaroj funkcias parlamenta grupo por Esperanto, Italio ŝajnas esti la dua lando kun organizita agado inter parlamentanoj. Iom da agado en la parlamentaj rondoj okazas ankaŭ en Belgio, Brazilo, Francio, Germanio kaj Hungario, sed tie ŝajne ankoraŭ ne formiĝis adekvata organiza kadro por tiu laboro.

Instruistoj

• En la marborda urbo Burgas, sude de Varno, tuj post la 63a UK komenciĝos serio de internaciaj kursoj por instruistoj kaj kursgvidantoj de Esperanto. La kursoj okazos en pluraj grupoj inter la 7a kaj 26a de aŭgusto 1978. Pliajn informojn petu de: Bulgara Esperantista Asocio, Bulvaro Ĥ. Botev 97, BG-1303 Sofia.

Kongresoj

• La 65a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazos la 26an kaj 27an de aŭgusto 1978 en la urbo Misima. Inter la eksterlandaj gastoj de la Kongreso ĉi-jare troviĝos ankaŭ la prezidanto de UEA d-ro Humphrey Tonkin. Detalojn pri la Kongreso petu ĉe la nova adreso de Japania Esperanto-Instituto: Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio, 162 Japanio.

Historio

• Antaŭ nelonge en Finnlando aperis 54-paĝa nacilingva broŝuro *Seitsemänkymmentä vuotta esperanton vaiheita Turussa 1906-1976*, kiu traktas la sepjardekan historion de la loka Esperanto-movado en Turku. La aŭtoro, s-ro Niilo Kavenius, konata loka ĵurnalisto kaj Esperanto-aktivulo, prezentas en la libro la agadon de la kvar antaŭaj kaj la laboron de la nuna Esperanto-societo en tiu finna urbo. Kvankam la celo de la

libro estas informi la nemovadan publikon pri unu el la aspektoj de la urba vivo, la libro kontribuas ankaŭ al la malabunda kaj nesisteme flegata branĉo de la movada historio. Samajn signifon kaj pretendojn havas la du volumoj (170 paĝoj) de *La historio de Esperanto-movado en Oosaka*, en kiu Sigeo Matumoto priskribas la movadan historion inter 1916 kaj 1951 en tiu japana urbo.

Interlingvistiko

• Universitataj disertacioj pri Esperanto tiel multiĝas lastatempe, ke ne plu estas novaĵo prinoti ilin. Komence de ĉi tiu jaro en la Filologia Fakultato de Pontificia Universidade Catolica en Rio-de-Janeiro magistriĝis s-ro José Passini per la disertacio "Estudo comparativo do esperanto com outras quatro linguas planejadas e com o português". En Malto, f-ino Mary Scicluna verkis pli ol 100-paĝan tezon pri "The Contribution of Esperanto to International Communication and Understanding" por la fineksamenado en la Porinstruista

Kolegio de Malto. Alia malta instruistino, Josephine Ciancio, en sia pasintjare aperinta libro *Power to the Man in the Street* dediĉis tutan ĉapitron ("One World Culture") al Esperanto kiel portilo de monda kulturo.

Libroj

• Dudek kvin jarojn post sia morto, Vasilij Eroŝenko (1890-1952) fariĝas furora nomo en sia patrolando Soveta Unio. En 1977 en Moskvo aperis, en la eldonkvanto de 15 000 ekzempleroj, 263-paĝa elekto ("Izbrannoe") el la verkoj de Eroŝenko kaj elĉerpiĝis en kelkaj tagoj, tiel ke ni malsukcesis havigi ekzempleron al la Biblioteko Hodler. Temis pri tradukoj de la verkoj de Eroŝenko el la japana, ĉina kaj Esperanto en la rusan lingvon. Ĝus aperis ĉe la sama eldonejo (Nauka) preskaŭ 300-paĝa biografio de Eroŝenko *Ĉelovek uvidevsij mir* (Homo, kiu ekvidis la mondon) de A.S. Harkovskij, denove en la eldonkvanto de 15 000 ekzempleroj. Lastatempe aperis libroj pri Eroŝenko ankaŭ en la ukraina lingvo. Krome, kelkaj lastaj jaroj alportis plurajn ruslingvajn studojn pri la vivo kaj verkaro de ĉi tiu Esperanta verkisto, kies ŝuldanto restas ankaŭ la Movado.

Persone

Harry



• Kiam iu forlasas sian ĝisnunan adreson — N-ro 1, Dag Hammarskjöld Plaza, Nov-Jorko, kaj tio estas la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj — ne povas temi pri simpla, nur administre notinda adresŝanĝo. La homo kiun rilatas la adresŝanĝo estas: Lia Ekscelenco Ralph Harry, Ambasad-

oro de Aŭstralio en Unuiĝintaj Nacioj. S-ro Harry, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, ekde la 1-a de septembro 1978 loĝos denove en sia hejmlando (8 Tennyson Crescent, Forrest, ACT., Aŭstralio 2063). Dum la pasintaj kvar jaroj s-ro Harry sukcesis ne nur roli kiel unu el la plej eminentaj diplomatoj ĉe UN, sed ankaŭ tre ekscelence — ni uzu tiun diplomatan neologismon — dediĉiĝi al senrezerva apogo de la Internacia Lingvo. Multaj novjorkaj iniciatoj dum la lastaj jaroj (v. ankaŭ la ĉefartikolon de ĉi tiu numero) firme ligiĝas al la nomo, prestiĝo kaj ardo de s-ro Harry.

Damjanov

• S-ro Veselin Damjanov, bulgara opereta kantisto, kiu ĉefrolas en la artaj programoj dum la lastatempaj Universalaj Kongresoj, gajnis la unuan premion en la konkurso por Esperanta kanzono, en Clermont-Ferrand (Francio), meze de majo 1978.

FINNA ĈEFDELEGITO HAVAS NOVAN ADRESON

S-ro Harri Laine, ĉefdelegito de UEA en Finnlando, havas novan adreson: Karhuniityntie 17, SF-02810 Espoo 81, Finnlando. Lia nova telefonnumero estas: 90 — 86 22 93. La antaŭe: 39135-3. La nova adresoj jam ekvalidis kaj ni petas niajn finnajn membrojn atenti pri tio.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BRITIO: P.M. Strapps.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

FR GERM: 174 Margarete Schumacher; 175 Hans Schütt; 176 Ellen Eggers. BELG: 177 L. Bernaerts-Toussaint; 178 Elfriede Ernst. DANL: 179 Ib Schleicher. FINNL: 180 Niilo Kavenius. ITAL: 181 Adelaide Casetta. NED: 182 E.J. Woessink. SVED: 183 Jim Hornö; 184 Amy H.L. Nilsson; 185 I. Nordlin; 186 G. Nordström; 187 G. Nylin; 188 Isidor Södermann; 189 S. Stenström. SVISL: 190 Margit Guldin. US: 191 Stefan Chobanoff; 192 W. W. Glenney; 193 H. Ledeen. BRAZ: 194 Jair R. Peixoto Laguna. NED: 195 R.H. Bossong; 196 A.M.E. van Walsem-Schutte. US: 197 E. James Lieberman.

DONACIOJ 1978 (Gld.) (ĝis la 30a de aprilo)

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: Heredaĵo D.M. Pot 110,05. Sumo ĉi-jara 27 714,13.

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio 43,60.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Nederlando: R. Moerbeek 200,00. Svedio: Leif Holmlund 100,00. Diversaj malgrandaj: 6,22. Sumo ĉi-jara 367,36.

FONDAĴO CANUTO: Finnlando: N. Kavenius 52,00. Nederlando: Frisa Esperantista Rondo 30,00; R. Moerbeek 110,00. Svedio: E. Brenander 47,65. Sumo ĉi-jara 824,22.

ĜENERALA KASO: Belgio: C.L. Peeters 69,00. Britio: E.B. Knight 168,48. Finnlando: E. Isomäki 35,36. Francio: R. Lemaire 49,78. FR Germanio: H. Bitterling 10,68;

M. Retzlaff 12,27; M. Vogel 13,08. Japanio: Tutomu Nisio 41,55. Nederlando: Anonime 56,58; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 50,00; Haga filio de LEEN 170,00; Teo Jung 100,00; H. Veenstra 25,00. Nov-Zelando: M.L. McNamara 119,90. Diversaj malgrandaj: 16,08. Sumo ĉi-jara 2 595,09.

PATRONOJ DE TEJO: 15 Renato Corsetti, Italio. 16 Enrique Gimeno, Hispanio. 17 C. Long, Britio.

AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Kanado: D. Hawley 601,00. Usono: W.H. Schulze 100,00. Sumo ĉi-jara 918,31.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

BONVOLU NE SKRIBI AL LA CENTRA OFICEJO DUM JULIO KAJ AŬGUSTO!

Ni afable petas la membrojn laŭeble ne skribi al la Centra Oficejo de UEA dum la monatoj julio kaj aŭgusto, se ne temas pri vere urĝaj demandoj aŭ mendoj. En tiu periodo pluraj oficistoj aŭ libertempas aŭ havas urĝajn kongresajn laborojn. Eventualajn vizitojn ĉiam klopodu anonci skribe aŭ telefone. Koran dankon pro via ĉi-rilata atento!

Nekrologoj

JÜRGEN BASTERT

En Berlino mortis la 20an de aprilo studento pri informadiko Jürgen Bastert (1955-1978), kiu dum la du lastaj jaroj konsiderinde kontribuis al la vigligo de la Esperanto-aktiveco en la Universitato de Berlino.



ERIK EKSTRÖM

En Gotenburgo (Svedio) la 7an de majo mortis s-ro Erik Ekström (1897-1978), vicdelegito de UEA kaj dum pluraj jardekoj aktiveco en la loka Movado. Li postlasis manuskripton de la traduko de la romano *Singulla* de la konata sveda verkisto Victor Rytberg.

RYŌYA NISIDA

Fakdelegito de UEA en Kisiwada (Japanio), pastro Ryōya Nisida (1911-1978), forpasis la 21an de aprilo. Li lernis Esperanton antaŭ pluraj jardekoj, tradukis kaj eldonis kelkajn librojn pri budhismo en Esperanto. Laste aperis lia traduko de *Vervekiĝo de budhismo*.

TONA M. DE QUAASTENIET

En Alkmaar (Nederlando) la 15an de aprilo mortis s-ino Tona M. de Quaasteniet (1889-1978), multjara aktiveco en la loka Movado kaj dum longa tempo delegito de UEA.

DANIEL QUARELLO

En novembro pasintjare, en Buenos Aires forpasis Daniel Quarello (1904-1977), italdevena argentinano. Li lernis Esperanton jam en 1915 kaj verkis Esperanto-lernilojn por ital-kaj hispan-lingvanoj. Lia *Perfektiga kurso*; *Plena traktato pri la sintakso* (1973) ankaŭ nun estas unu el la plej bonaj internaciaj lerniloj pri la Esperanta gramatiko.

PAVLOS GIANELIAS

Fine de marto en Liono (Francio), post preskaŭ 60-jara aktiveco en la loka Movado, forpasis grekdevena veterano P. Gianelias (1883-1978).

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 20

(pri la demando vidu nian majan numeron)

1. Jean Ribillard, kiu servis kiel oficiro de la franca armeo en la norda Afriko, priskribas la dezertan pejzaĝon de la okcidenta Saharo en sia kolekto de vojaĝskizoj *Vagado sub palmoj*, eldonita en 1956 kaj denove en 1977.

2. La arkta naturo kaj la homoj kaj bestoj de Laponujo estas pentritaj per trafaj vortbildo en *Kie boacoj vagadas* (1967) de la finna verkistino Eija Salovaara.

3. La aŭstraliano Kenneth G. Linton rakontas siajn travivaĵojn en la ĝangaloj kaj lagunoj de Nov-Gvineo dum la dua mondmilito en *Kanako el Kananam* (1960).

4. En la romano *Metropoliteno* (1933 kaj 1977) de Vladimir Varankin, Vitalij, la ĉefrolanto, vojaĝas de Stettin al Leningrado sur la germana vaporŝipo "Preussen", kiu estas trafita de nokta ŝtormo en la Balta Maro.

5. En *Tempesto super Akonkagvo* (1959) oni povas legi, kiel Tibor Sekelj sukcesis venki la profundan neĝon kaj la altajn rokojn de Akonkagvo, la plej alta monto en Sud-Ameriko, por atingi la pinton.

DEMANDO 21

(la respondo aperos en nia oktobra numero)

Tiu ĉi demando estas en la formo de ĉeno, en kiu ĉiu ero interligiĝas al la antaŭa kaj al la sekva parto de la demando. Ĝi konsistas el fragmen-toj de poemoj, verkitaj de kvin poetoj, kiuj temas pri la poetoj mem. Leginte la versojn cititajn ĉi-sube, provu diveni la nomon de la aŭtoro kaj ankaŭ la nomon de la verkisto al kiu la versoj rilatas.

a. Hungara literaturisto, konata kiel "la poeto de la poetoj", verkis serion da humuraj rondeloj priskribantaj eminentajn esperantistojn. En unu el

ili, li skribas pri sia samlandano, kiun oni nomis "la poeto de la popolo". Jen la unua kaj tria strofoj:

....., homo homa
*Homecon serĉas malespere
Kaj luktas arde kaj kolere
Kun la Milito sango-voma.
Pri ĉio misa, falsa, gnoma
Indignas li profet-severe,
Sed ofte ridas ni sincere,
se ĉarmas nin per ŝerc' aroma.
....., homo homa.*

b. "La poeto de la popolo" siavice salutis alian samnacion verkiston, tiam loĝantan en Svedio, okaze de la 70a datreveno de lia naskiĝtago en 1961:

*Amata frato, Feri kara,
montrilo de l' vivjaroj saltas. . .
Ĝi montras cin nun sepdekjara
kaj morgaŭ pli, ĉar Temp' ne haltas.*

*Evitu cin, kio afliktas
kaj dia providenca varto
al ci jardekojn lasu vivi,
en sano kaj sereno rara
talente brile plu aktivi,
amata frato, Feri kara!*

c. Jen kiel tiu ĉi prikantita verkisto prezentas sin en la tria strofo de sia "Vivraporto", kiu aperis en 1932:

*Junage mi ja panon havis,
Eĉ truajn ŝuojn sur pied',
Ludiloj fremdaj min tre ravis,
Mi sonĝis pri velociped',
Sed mia am' – platona restis,
Kaj ankaŭ poste, dum mi estis
Lernanto de la gimnazi',
Mi ĝuis nur en fantazi'.
Nun sekvis zorgoj: kie prenu
Gepatroj monon por la fil'.
Sopiris ĉiuj ni kun mil
Esperoj, ke la Tago venu.
Ĝi venis: mi al patra dom'
Fiere iris kun diplom'.*

ĉ. Post la morto de la aŭtoro de tiu ĉi aŭtobiografia poemo en 1967, unu el la fondintoj de la Skota Skolo en la Esperanta literaturo omaĝis

al li per jenaj versoj:
*Estingiĝis meĉ' en nordo,
disluminte kun fidel',
malgraŭ blovoj de la sorto,
tra la jaroj sen ŝancel'
de Danub' ĝis sveda bordo:
sankta flamo en kapel'.
Korojn multajn ĝia lum'
gvidis milde al plenum'.*

d. Kiam la poezia ĉefverko de la skota poeto estis eldonita la unuan fojon en 1956, "la poeto de la poetoj", kiu estas ankaŭ elstara figuro en la Budapeŝta Skolo, sendis al la aliskolano detalan versleteron pri-komentantan la longan filozofian poemon. Jen la sesa parto:

*Ĉu mi ĝuste interpretis
vin, ho kara, aŭ falsis?
Nu, mi sur paperon ĵetis,
kio tra la cerbo valsis,
kiam "La Infana Raso"
min ekkaptis kaj katenis,
kaj al sia vers-amaso
ĉiam min re- kaj retrenis.
Dum la lego kaj relego
kreskis mia poemego,
nun ĝi iru,
al vi, kiel dank-herold'.*

e. Ankaŭ en la formo de korespon-daĵo estis la plej nova verskolekto de la skota poeto. Ĝi konsistas el poemoj en rondel-formo, kiujn li inter-ŝanĝis kun eminenta angla poetino. Li priskribas ŝin jene en la unuaj du strofoj de la 17a poemo:

..... – *energio nerva,
mikso de timo kaj aplombo,
eksplodas kiel atombombo
aŭ tremas pro fuĝemo cerva.
Ŝi estas, unuvorte, verva,
kaj senspiriga kiel trombo –
....., energio nerva
mikso de timo kaj aplombo.*

f. Okaze de la morto de "la poeto de la popolo", la poetino rimportre-tita ĉi-supre dediĉis poemeton al li, taksante liajn meritojn en la unuaj du strofoj:

Foresto de la prezidanto

D-ro TONKIN petas atenti, ke dum la monatoj julio kaj aŭgusto li for-estos el la hejmo pro vojaĝado en Eŭropo kaj Azio. Li anticipe pardon-petas pro nerespondo al leteroj dum tiu periodo. Urgajn mesaĝojn bon-volu sendi al li pere de la Centra Oficejo, kies oficistaro scios kiel lin kontakti kaj kien plusendi eventua-lajn urgajn korespondaĵojn.

Li kaptas la okazon memorigi siajn korespondantojn pri la absoluta ne-ceso skribi al lia usona adreso el aliaj kontinentoj nur **aerpoŝte**. En tiu ĉi periodo de ŝrumpanta pasaĝera mar-trafiko, la mara poŝto fariĝas ĉiam pli malrapida, tiel ke nun ordinara letero el Eŭropo bezonas eĉ du mo-natojn por atingi Usonon. Ĉe pres-aĵoj la daŭro estas foje eĉ pli longa.

*Nenion havis vi, kaj ĉion donis;
en neĝo Siberia, koro-varmon;
sanigan spriton, respondigan ĉarmon
kie banalaj vivoj monotonis.*

*Vi venis, kien iu vin bezonis,
kareson donis aŭ kunsentan larmon;
vi amis nin, malican homan svarmon,
amadis daŭre, kiom ajn vi konis.*

g. Fine, ni revenas al la unua ero de la ĉeno, kiam "la poeto de la popolo" sendis versleteron al "la poeto

de la poetoj", okaze de ties 70a datreveno. Ĉi tie estas la komenco de la dua strofo:

*Per ardo de poet' vi arton forĝis,
magie al la versoj rimojn sorĉis,
kaj ravis per la lert' en pensoplekto,
instruis nin pri formoj de l' Perfekto
kaj kultivante la literaturon
vi sola kreis mem – literan turon,
en kies labirinto ĉiu niĉo
admiron vekas per la pompa riĉo
de cent poetoj, mil poemoj eble.*

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ, 2a eldono (XVI+320+10 paĝoj), favore akceptita de Esperanta gazetararo. Mendojn akceptas Isaj Dratwer, Poŝtkesto 3396, Bat Jam, Israelo kaj la Libroservo de UEA. Prezo: 30,00 ned. guld., plus 10% afranko.

Angla librovendejo ekspedas ĉiujn librojn eldonatajn en Britujo je nur 15% pluskosto. Ŝparu monon mendante de: Language Services, 17 High Street, ST. Peters, Broadstairs.

Optimala Esperanto-Ortografio de A. Lienhardt. Ebligas elimini la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, kaj apliki q, w, x, y bezonatajn en sciencoj. Prezo: 9,00 gld. Libroservo de UEA (aŭ ĉe la aŭtoro: 24 ave Riedisheim, F-68100 Mulhouse, Francio).


22-jara usona esperantisto deziras korespondi pri sciencfikcio kaj fikciaj filmoj: Kenneth C. Nunn, 8027 Old 3rd St. Rd., Lou, Ky. 40214, Usono.

Mansureh Hajiha (Teherano) ricevis 230 korespondproponojn post anonceto en nia revuo pasintjare. Ŝi pardonpetas pro maleblo respondi al ĉiuj skribintoj.

Verkisto kaj artisto, kun dek profesioj, dufoje magistro pri arto, serĉas belan esperantistaron (ĝis 35 jaroj), el kapitalismaj landoj de Eŭropo, por edzinigi ŝin. Sendu foton kaj aliajn detalojn al: s-ro Gheorghe Morar, 587 Woodward Ave., Ridgewood, Brooklyn, New York, N.Y. 11237.

Sendu korespondanoncon (nomo, aĝo, profesio, adreso, intereso, korespondlingvoj) al Internacia Multlingva Koresponda Servo, P.O.Box 28111, Tel-Aviv, Israelo. Aldonu \$2 (6 resp.kup.) por anonco kaj \$1 (3 resp.kup.) por revuo kun via anonco.

Pri radio-elektroniko, psikologio, muziko, libroj kaj filatelo korespondus 33-jara: s-ro Ramutis Kilčiaus-



kas, Bites 11 A/1, SU-235300 Panevezys, Litovio, Soveta Unio. Li korespondas en Esperanto, angla, franca kaj germana.

Zamenhof profunde kredis je iu Mistera Forto, kiu regas la mondon. Kvankam hebreo, li tute ne estis kontraŭ kristana koncepto de tiu Mistera Forto. Kontraŭe, en la Unua Kongreso li finis sian paroladon per la konata preĝo; li presigis en sia Unua Libro la preĝon *Patro Nia* kaj kelkajn frazojn el Genezo; la farenda regulo: *Agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi troviĝas ankaŭ en ĉiuj kristanaj biblioj*. Ni povas diskuti pri la aliaj konceptoj de Zamenhof, sed mi ĝojas esti kristano laŭ la *Surmonta Prediko*, kune kun la Za-

menhofa doktrino Homaranismo. Staf Goossens, Sterrestraat 139, B-9100 Lokeren, Belgio.

Naturistoj / Nudistoj, ankaŭ en ne-transpagipovaj landoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Petu informojn kaj aliĝilon de H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Esperantistoj, kiuj intencas viziti Bagdadon, estas invitataj esti niaj personaj gastoj dum 7–10 tagoj, inkluzive de kelkaj ekskursoj en la lando (senpage). La edzino kaj la 3½-jara etulo tamen atendas simbolajn donacojn kaj helpon pri domlaboro; ankaŭ mi pri la lasta numero de anglalingva *Playboy*. S-ro Husen Mohammed Al-Amily, Dafterdar Building, apt. 5/8, Banks' Street, Baghdad, Irako.

Vjetnamaj gekursanoj volas korespondi tutmonde, sed precipe kun Japanio, Bulgario kaj Hungario. Skribu al la kursgvidanto: s-ro Ngô Chân Lý, 539/TK2/20 Trần hưng Đạo, T.P. Hồ Chi Minh, Vjetnamio.

19-jara universitatano serĉas letergeamikojn en Okcidenta Eŭropo: Adrian Hall, 14 Kintore St., Wahroonga 2076, N.S.W., Aŭstralio.

Materialo-ekonomisto, 59-jara, deziras interŝanĝi bildkartojn kun la tuta mondo: Heinz Siegel, Dammstr. 49c, DDR-92 Freiberg, DR Germanio.

Eldonejo TK en Antverpeno estos fermita dum julio kaj aŭgusto, pro ferioj. Oni bonvolu ne skribi al la eldonejo dum tiu periodo. Ĉiujn TK-librojn vendas kun eldonista rabato la Libroservo de UEA.

Kompetenta ilustristo serĉata por 100-paĝa infanlibro de konata aŭtoro. Skribu al la Eldonejo TK, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio.

SE VI PLANAS VOJAĜI AL ĈEĤOSLOVAKIO...

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.



Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1977, p. 66. Mal-longigoj: I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840kHz). I.P. ORF, Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 41m, 30m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 25m, 19m. I.
18.20-18.30 Lisbono, 49.79m (6025 kHz), 30.80m (9740kHz). I.P. Radio Difusão Portuguesa, Esperanto, rua do Quelhas, Lisboa 1, Portugalio.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Ital.
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190kHz), 41.38m (7250kHz), 31.17m (9625kHz), 31.10m (9645kHz), 25.63m (11705kHz), 19.84m (15120kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
20.50-21.00; 21.20-21.30; 21.50-22.00; 22.20-22.30 Lisbono, kiel je 18.20.
23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m

(1400kHz). P. Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, Rio de Janeiro, Brazilo.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
01.20-01.30 kaj 02.50-03.00, Lisbono, 31.13m (9635kHz), 25.42 m (11840kHz), kiel dimanĉe.
18.00-18.15 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). P. Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.
22.05-22.15 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 25.60m (11720 kHz), 19.60m (15305 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.90m (21585 kHz). P.

Marde

20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 50.17m (5979 kHz). I. Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.
22.45-23.00 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

Merkrede

22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

17.50-17.55 Vieno, 203m (1475kHz). I.
18.00-18.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
22.05-22.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

Vendrede

20.00-20.30 Pekino, 43.73m (6860 kHz), 31.98m (9380 kHz), 26.09m (11500 kHz). I.
20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

Sabate

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105kHz). I.P.
18.00-18.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
22.05-22.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

- Stacioj nur loka aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Muritiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.
- Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28m, 48.66m, 31.46m), Lisbono (dimanĉe), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano (196m, 48.47m, 41.38m, 31.10m), Vieno, Zagrebo, Ibra Radio.
- Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Lisbono (lunde en Sud-Ameriko), Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Rio de Janeiro kaj Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Berno (13,90m en Sud-Ameriko).
- Stacio aŭdebla en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (25.60m, 19.60m, 16.83m, 13.90m), Vatikano (31.17m, 25.63m, 19.84m).

Ne sufiĉas nur aŭskulti radio-programojn en Esperanto! Necesas foje skribi al la redakcioj. Radio-elsendoj ne havas abonantojn kaj eldonkvantojn por kalkuli. Viaj leteroj estas la sola signo pri la populareco kaj dezirindeco de tiu valora praktika utiligo de la Internacia Lingvo.

CENTRO
DE ESPLORO
KAJ DOKUMENTADO
PRI LA MONDA
LINGVO-PROBLEMO

esperanto en perspektivo


FAKTOJ
KAJ ANALIZOJ
PRI LA INTERNACIA
LINGVO

LONDON
ROTTERDAM
1974

La unua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas jam de jardekoj elĉerpita, la dua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas nun prilaborata, sed oni atendas ĝian aperigon ankoraŭ plurajn jarojn. Feliĉe, ekzistas **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**, kiu estas la movada

enciklopedio de la nuna tempo

Fakuloj epitetoj ĝin jene: monumenta enciklopedia verkego (Waringhien), epopeo (Pool), giganta trezoro (Blanke), senprecedenca entreprenado (Régulo), kvazaŭ streĉa romano (Wells).



Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustrapaĝoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

ISBN 92 9017 016 6

300 gastigejoj pere de la Pasporta Servo

Tiom da esperantistoj en pli ol 40 landoj pretos senpage gastigi vin. Listigas 300 adresojn la ĵus aperinta "Listo de gastigantoj 1978" de la Pasporta Servo de TEJO. Aĉetante tiun libron (15 francaj frankoj aŭ 10 irpk.) oni aŭtomate aliĝas al la servo. Mendoj kaj detaloj ĉe: J.-M. Cash, 9, rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francio. Pĉk. 25 426-58 Paris.

Aliĝilo kaj unua informilo por la 35a Internacia Junulara Kongreso (20a — 27a de julio 1979), estas haveblaj de la kongresa adreso: 35a IJK, 1979, Postbus 4083, 9701 EB Groningen, Nederlando. La unua limdato por kotizoj estas 78 12 31.


Subtenu la tutmondigon de Esperanto per donaco al la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe la CO de UEA

Fondaĵo Azio-Afriko

La Struvelpetro



Devas ekzisti iu al la Movado nekonata kialo pro kiu germanaj bibliotekoj, muzeoj kaj unuopuloj lastatempe remalkovris la Esperantan eldonon de **LA STRUVELPETRO** kaj aĉetis ĝin eĉ sen koni la lingvon! Temas ja pri la plej bela infana libro nun havebla en la Esperanta libromarkato. Mendu do ĉe UEA ĝis ankoraŭ eblas! Prezo: 16,20 gld.



Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado

Abonprezo: Unu
volumo (3 nume-
roj po 64 paĝoj)
kostas 33,00 gld.
(por Nederlando:
34,32 guldenojn).
Vi povas pagi al ĉi-
uj UEA-perantoj.

LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ LINGVO-PLANADO estas internacia kaj interfaka revuo. Ĝin publikigas Mouton, la ĉefa lingvistika eldonejo en la mondo. La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) en Rotterdam aŭspicias ĉi tiun revuon kaj dediĉas ĝin al ĉiuj, kiuj havas, aŭ strebas por solvi, lingvajn problemojn. En tiu lasta kategorio troviĝas, evidente, ĉiu aktiva membro de la E-movado.

LPLP interesas esperantistojn pro du ĉefaj kialoj. Unue, ĝi resumas ĉiun artikolon amplekse en Esperanto. Kaj due, ĝi pritraktas ĝuste tiujn sociajn aferojn, kiujn esperantistoj prilaboras: lingvajn diferencojn, barojn, diskriminacion kaj lingvan planadon — la konscian kaj sistemecan solvodon de lingvaj problemoj.

Se vi ankoraŭ ne abonas *LPLP*, faru tion nun! Simple sendu la abonilon al CED (ĉe UEA). La adreso estas ĉi-sube. Se vi jam estas abonanto, bonvolu certigi, ke ankaŭ bibliotekoj kaj fakuloj proksimaj al vi abonas ĝin, se ĝi estas en ilia intereskampo. Se vi preferas, donu al CED la plenan adreson de la koncernulo; ni ekspedos taŭgan informmaterialon rekte tien.

LPLP — POR KOMPRESI LA SOLVON ONI DEVAS KOMPRESI LA PROBLEMON

Adreso de CED: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Malamon kaj militon evitos nur

**DISVASTIGO DE RACIAJ SOLVOPROPONOJ
POR INTERNACIAJ PROBLEMOJ!**

N-ro 4: *INSTIGOJ AL NOVA MONDA EKONO-
MIO-ORDO KAJ EFIKA HELPO AL EVOLUIGO*


Pagu öS 54,— al d-ro J. Hartl, Viena poŝtĝironto
7503.218 aŭ mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Antaŭ la 65a Universala Kongreso en Stokholmo
en 1980 necesas lerni ion esencan pri la kongresa
lando Svedio! La plej bona maniero estas legi:

FRITHJOF -SAGAÖ

fama verko de Esaias Tegnér (1782-1842), kiun
tradukis W.Th. Oestre kaj dulingve eldonis Gabri-
elli. 385p. 20cm. 36,00 gld. Mendu ĉe UEA!

Nun en nova vesto:



ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Red. Auld kaj Rossetti

319p. broŝurita 13,50 gld.

ISBN 92 9017 003 4

**GRANDA ANTOLOGIO
DE GRANDA LITERATURO**